

# EL POPOLA ĈINIO

中國新道

6

2000

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esp.

ŭ-19034/2000

La lastaj arbohakistoj


Ĉu konfuceanismo furoros en la 21-a jarcento?

Progresigi la okcidenton de Ĉinio

# ★ POPOLA ĈINIO



“Mi pentras Eŭropon” 16



Ŝtala urbo ĉe kanjono 6



La lastaj arbohakistoj 28

Vestoj de taĝikoj 24



20  
Amo al Engebei



### 3 INTER NI

4 Progresigi la okcidenton de Ĉinio

### 8 ĈINAJ E-ISTOJ:

Esperanto — spegulo de vivo

### 10 50 JAROJ — EPC:

Esperanto— ponto kaj ligilo inter la popoloj;  
La kvina suno

### 12 ORIGINALE VERKITAJ:

Somera lotusfloro

### 14 POR KOMENCANTOJ:

Viva fosilio — ornitorinko

### 15 ESP-NOVAĴOJ

34 Porcelanaĵoj de Fengxi

36 La origino de la ĉina civilizacio

### 38 ĈINA KULTURO:

Ĉu konfuceanismo furoros en la 21-a jarcento?

40 Serĉi antikvajn morojn de Va-nacio

42 Ĉu vere plezuriga lernado?

44 Fragmentoj el mia vizito en Japanio (II)

### 46 EL ĈINAJ GAZETOJ

48 De Beijing al Tel-Avivo

### 50 KURANTAJ AFEROJ

### 51 ĈINAJ METIARTAĴOJ:

Bunta vitra botelo

## INTER NI

En la tagoj, kiam ni preparis nin por festi la 50-jariĝon de "El Popola Ĉinio", ni ricevis multe da gratulaj leteroj, telegramoj kaj artikoloj, el kiuj iuj estis jam publikigitaj en la maja numero kaj aliaj legiĝos en la julia kune kun niaj raportoj pri la jubileado. Ni volas diri, ke ni rigardas la varmajn vortojn de la legantoj kiel ilian kuraĝigon al ni. Pro tio ni publikigis kaj publikigos ilin preskaŭ senŝanĝe. La nuna numero estas la 501-a. Prave diris s-ro Gerrit Berveling, ke tio estas nova deirpunkto. Multaj el niaj legantoj esprimis sian bondeziron al nia revuo, ke ĝi akiru pli grandajn sukcesojn en la jaro 2000 kaj la sekvaj jaroj. Juna vjetnama samideano Lai Thi Hai Ly skribis al ni: "Mi promesas de tempo al tempo sendi al vi miajn artikoletojn kiel kunlaborojn pro la kreskigo de amikecaj kaj kulturaj rilatoj inter la geesperantistoj de ambaŭ niaj landoj." Ĉio ĉi profunde emocias nin kaj kuraĝigas nin por nia laboro en la estonteco. Koran dankon al ĉiuj niaj legantoj.

La Red.



Infanoj ĉe ruĝaj lanternoj  
Foto de Li Changjiang

En festaj tagoj ĉinoj kutime pendigas ruĝajn lanternojn ĉe pordoj. Tie, kie pendas ruĝaj lanternoj, regas gaja atmosfero. Jen gajaj infanoj ludantaj ĉe ruĝaj lanternoj.

### EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77,  
Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:  
+86-10-6832 1808

Retpoŝto:

epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

# 6[501]2000

# Progresigi la okcidenton de Ĉinio

La okcidento de Ĉinio kovras 5.4 milionojn da kvadrataj kilometroj, kaj la loĝantoj konsistigas trionon de la tuta loĝantaro de la lando

de ZHANG QINGZHEN

**L**A oriento de Ĉinio progresas pli rapide ol la okcidento pro la favoraj kondiĉoj de klimato kaj geografio. La laborraporto de la ĉina registaro al la Tria Sesio de la Naŭa Tutlanda Popola Kongreso en la unua tagdeko de marto detale eksplikis la strategion de progresigo de la okcidento de Ĉinio, kaj la temo estis plej multe preparolata de la popolaj reprezentantoj; kaj la okcidento, kiu konsistigas pli ol duonon de la tero de Ĉinio, vigliĝos de tio.

## LA ESPERO DE LA OKCIDENTANOJ

En aŭtuno de 1999 centmiloj da kamparanoj de Shaanxi-provinco ebenigis kampojn kaj faris fosaĵojn sur la loesaj deklivoj, kaj sole en unu urbo 60 000 hektaroj da kampoj estis refoje ordigitaj; kaj ĉi-printempe tiuj kampoj origine por forstumado kaj paŝtado estis rearbigitaj aŭ reherbigitaj. De tio komenciĝis la granda plano "returni grenkampojn en arbarojn kaj herbejojn". Tio estis rigardata kiel uverturo de la "Progresigo de la okcidento". Samtempe, en la fama olekampo Karamay oni jam finis la akvokondukan sistemon kun investo de 20 milionoj da juanoj (ĉ. 8.3 juanoj egalas al 1 usona dolaro). La sistemo servos al la irigacio de 33 mil hektaroj da tero nove



Ĉina okcidenta loĝanto intervjuata de raportisto

eksploatita de la loĝantoj de Karamay.

Loĝantoj de Karamay sin okupantaj ĉefe pri petrolo industrio, volas postlasi al siaj posteuloj alispecan industrion pere de la bona ŝanco de progresigo de la okcidento, dum kamparanoj en Shaanxi estas penantaj returni la grenkampojn en arbarojn kaj herbejojn.

La okcidento de Ĉinio inkluzivas la provincojn Shaanxi, Gansu, Qinghai, Sichuan, Yunnan kaj Guizhou, la aŭtonomajn regionojn Ningxia, Xinjiang kaj Tibeto, la municipon Chongqing kaj la okcidentan parton de la Interna Mongolio. Tiuj lokoj kovras 5.4 milionojn da kvadrataj kilometroj, kaj la loĝantoj

konsistigas trionon de la tuta loĝantaro de la lando. En tiu areo estas la fonto de la Flava Rivero kaj Yangzi-rivero, viglis la Silka Vojo en la antikveco. Sed en la lastaj pli ol 1 000 jaroj la okcidento de Ĉinio multe postrestis, kaj politikistoj de multaj dinastioj arde deziris progresigi ĝin.

## BONA ŜANCO POR PROGRESIGO

En la lastaj 20 jaroj tiuj provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj la municipo Chongqing havis nemalgrandan ŝanĝiĝon, sed kompare kun aliaj regionoj de Ĉinio, la lokoj restas povraj. Laŭ statistiko en la fino de 1998, la

totala produktovaloro de tiuj lokoj konsistigis nur seponon de tiu de la lando, kaj plejparto de la 40 milionoj da malriĉegaj homoj de la lando vivas en tiu areo. Tiuj lokoj aŭ troviĝas ĉe la landlimoj, aŭ estas dense loĝataj de naciminoritatoj. Dum longa tempo la ekonomio de tiuj lokoj progresas malrapide. Tio estos malutila al la stabileco de la socio kaj malhelpos la kontinuan kaj sanan disvolviĝon de la tuta nacia ekonomio.

Laŭ la tuta strategio de la disvolviĝo de la nacia ekonomio, la ĉina registaro decidis utiligi la avantaĝon de la oriento kaj unue rapidigi ĝian reformadon kaj pordomalfermon, por ke ĝi la unua disvolviĝu. Ĝia dua paŝo estas stimuli la disvolviĝon de la okcidento, post kiam la disvolviĝo de la oriento atingos certan nivelon, nome progresigo de la okcidento devas atendi konvenan ŝancon.

Ŝajne nun pretiĝis la kondiĉoj por rapidigo de disvolviĝo de la okcidento kaj venis la ŝanco. Tial la progresigo de la okcidento, kiel grava strategia tasko de la lando, estas metita sur pli elstaran pozicion.

## AVANTAĜOJ DE PROGRESIGO DE LA OKCIDENTO

La okcidento havas vastan arcon, kie la prezo de tero kaj pago por labormanoj estas relative malaltaj. En la okcidento riĉas rezervoj de petrolo, karbo, kalio kaj fosforo, kaj krome tie abundas ankaŭ aktinidoj kaj vinberoj. Pli grave estas, ke la procentoj de sciencistoj kaj teknikistoj en la okcidento estas pli grandaj ol la meza nivelo de la lando.

Aŭtoritatuloj opinias, ke investantoj certe multe profitos, se ili plenplene utiligos la avantaĝojn de la okcidento. Lastatempe koncernaj departementoj sin klinas super ellaborado de katalogoj de la

industrioj por fremdlandaj kapitaloj. La ĉina registaro jam apertigis financon, asekuron, telekomunikon kaj aliajn sume pli ol 10 kampojn, kaj la kondiĉoj por investado estas pli favoraj kaj la procentoj de akcio pli multaj. La provincoj kaj aŭtonomaj regionoj de la okcidento jam anoncis siajn temojn privilegie por investado, ekzemple aŭtovojo, fervojo, civila aerodromo kaj elektrejo. La Xinjiang-a Ŭjgura Aŭtonoma Regiono emfazis la temojn de akvoadministrado, fuelo, trafiko kaj telekomuniko. Xinjiang havas la plej grandan rezervokvanton de nafto, naturgaso kaj aliaj 6 naturaj fueloj en Ĉinio, kaj disvolvo de tiuj industrioj vidigas esperdonan perspektivon.

## PLENENERGIE FARI GRAVITAJN KONSTRUADOJN

Fakte progresigo de la okcidento komenciĝis jam en la lastaj dekoj da jaroj kaj atingis certan sukceson. Sed ĉi-jare la ĉina registaro akcentis la progresigon de la okcidento, kaj kio estas la diferencoj? Oni trovos respondon en la 5 direktivaj aranĝoj publikigitajn de la registaro pri la progresigo de la okcidento. Tiuj aranĝoj inkluzivas rapidigon de konstruado de fundamentaj instalaĵoj, inĝenierion de ekologia konstruado, aktivan reguligadon de industria strukturo, disvolvon de scienca kaj eduka afero kaj stimolon de disvolviĝo de neŝtata ekonomio. La plej granda diferenco de la ĉi-foja progresigo de la okcidento kuŝas en tio, ke la gravita punkto de la ŝtata investo estos metita sur protekton de ekologia medio kaj konstruadon de fundamentaj instalaĵoj.

Pro la klimata kialo, la vasta areo de la okcidento sentas seriozan akvomankon, kaj plie, daŭras la homa detruo, konsekvence pli kaj pli serioziĝas la

erozio kaj polucio. Malbona estas la ekologia medio de la okcidento. Por restarigi kaj plifortigi la ekologian medion de la supra kaj meza basenoj de la Flava Rivero kaj Yangzi-rivero, la okcidentanoj devas returni grenkampojn en arbarojn kaj herbejojn. Pro tio la registaro disponigos grandan kvanton da greno al la okcidento kaj decidis investi 1.9 miliardojn da juanoj, por ke 340 mil hektaroj da grenkampoj estu redonitaj al forstumado kaj herbizado. En redonado de grenkampoj al forstumado kaj herbizado la registaro praktikos individuan respondecan sistemon, kaj la politiko validos 30 jarojn. Bremsi perdon de akvo kaj grundo, konstrui ekologian medion, praktiki sciencan terkulturon kaj disvolvi multflankajn entreprenadojn estas nepre necese por ke la kamparanoj sin liberigu de malriĉeco.

Bonigi la kondiĉojn por ekzisto kaj medion por investo estas la ĉefa celo de la progresigo de la okcidento. Por tio la alia grava enhavo de la progresigo de la okcidento estas konstruado de fundamentaj instalaĵoj. La vasta okcidento de Ĉinio estas maldense loĝata, kaj multaj montoj kaj riveroj malfaciligas la trafikadon kaj komunikadon. La nuna konstruado de fundamentaj instalaĵoj bezonas grandan investon. Pri tio ĉefe la registaro respondecos, kaj samtempe la registaro instigas la orion kaj eksterlandon al investado.

La oriento estas tre entuziasma al la progresigo de la okcidento. Kaj por la oriento tio estas ankaŭ malofta ŝanco por ĝia disvolviĝo. Kun la celo progresigi kune kun la okcidento, la orientanoj estas pretaj ŝanĝi sian teknologiojn, fakulojn, administran superecon kaj informadikon kontraŭ la abundaj riĉfontoj kaj granda latent forto de la merkato de la okcidento. ■

# Ŝtala urbo ĉe kanjono



Pro tio en la 60-aj jaroj de la 20-a jc. kelkdek miloj da sciencistoj, teknikistoj kaj laboristoj venis tien por ekspluatado. Panzhuhua tuj akiris famon tra la tuta lando pro sia grandega ŝtala kompanio

de ZHENG ZHENJIE

**E**LIRINTE el la stacidomo de la urbo Panzhuhua, Si chuan-provinco, mi vidis, ke ĉie prosperas altaj kapokarboj (Panzhuhua ĉinlingve signifas kapokarbon) kun ruĝaj floroj. Ili kreskas ekskluzive en suda Ĉinio. Pro tio la juna urbo ricevis sian nomon.

## DE VILAĜETO AL MODERNA URBO

Antaŭ 35 jaroj, tie estis vilaĝeto, kiu mankis sur mapo, kaj vivis nur 7 familioj. Tie estas kanjono en la supra baseno de Yangzi-rivero. Ĉe breĉiĝo de rokoj senĉese elŝprucas varma magmo kun multspecaj minaĵoj, kiuj formas "bovlon de trezoroj". El la 35 konstatitaj minaĵoj la plej gravaj estas vanado, titano kaj magnetito.

Pro tio en la 60-aj jaroj de la 20-a jc. kelkdek miloj da scien-

cistoj, teknikistoj kaj laboristoj venis tien por ekspluatado. Panzhuhua tuj akiris famon tra la tuta lando pro sia grandega Ŝtala Kompanio.

Kompare kun aliaj samspecaj entreprenoj, kiuj troviĝas sur ebenaĵoj, la Panzhuhua-a Ŝtala Kompanio estas originala: ĝi situ-

ŝtala produktokvanto de 3 milionoj da tunoj.

## ABUNDAJ RIĈFONTOJ

Komence de la nova jarcento la ĉina registaro ellaboris la strategion pri grandskala ekspluatado de la okcidenta regiono de Ĉinio. Panzhuhua sendube ludos gravan rolon ĉi-flanke.

Panzhuhua nomiĝas ankaŭ suna urbo. Ĉiujare ĝiaj sunaj tagoj ampleksas 2 700 horojn, malpli multe nur ol Lhasa. Ĝia klimato estas subtropika, taŭga por disvolvo de apartaj agrikulturaj branĉoj.

Panzhuhua estas ĉe bordo de Jinsha-rivero, parto de Yangzi-rivero, tie ĝi kunfluas kun Yalong-rivero, branĉo de

Yangzi-rivero. Tie la akvo abrupte falas en profundan valon, pro kio la loko abundas je hidraŭlika energio. Tie la ekspluatebla energia fonto konsistigas pli ol 18% de



Vanado transportota aliloken

as en montaro. Oni tie konstruis 3 grandajn terasojn el 23 malgrandaj. Kaj sur tiuj terasoj kun 2.5 kvadrataj kilometroj estas granda ŝtala kompanio kun jara

tiu de la tuta lando. Sole en Panzhuhua kun radiuso de 45 km estas 4 lokoj taŭgaj por konstrui grandajn kaj mezgrandajn hidroelektrajn kun totala generatora kapacito de 7 milionoj da kW. La hidroelektraj Ertan, la plej granda elektraj en Ĉinio, finkonstruita en la fino de 1999, ja situas sur Yalong-rivero. Ĝia hiperbola digo altas je 240 metroj, kaj ĉiujare la elektraj produktas 17 miliardojn da kWh da elektro.

Kvankam Panzhuhua ne estas granda urbo, tamen tie la rezervokvanto de fero konsistigas 20% de tiu de la tuta lando, kaj tiuj de raraj kaj valoraj metaloj vanado kaj titano estas gravaj en la tuta mondo. Esplorante en Panzhuhua, iu alilanda metalurgo humure diris: "La Dio estas maljusta. Se la trezoro estus en nia lando, nia nazo estus tenata pli alten." La Panzhuhua-anoj bone scias sian respondecon.

Vanado kaj titano, uzataj en altteknologia kampo, kiaj mar-navigacio kaj aviado, estas favorataj en la monda merkato. Tamen komence oni ne povis ekstrakti vanadon kaj titanon el fera erco per ordinara fornego. Ĉinaj metalurgoj foje-refoje eksperimentis kaj sukcese fondis la plej grandan ferŝtalan kombinatun en okcidenta Ĉinio, kiu estas ankaŭ la plej granda ŝtala bazo por fervojaj reloj en Ĉinio, kaj ili kreis novan teknologion por rekte ekstrakti vanadon el fera fluidaĵo. Dank' al tio, Ĉinio, la antaŭa importa lando de vanadaj produktaĵoj jam fariĝis la eksporta lando. La tekniko de Ĉinio pri titana ekstrakto evoluis de industria eksperimento al produktado.

En la 51-a Internacia Kunveno de Vanado okazinta en Usono, la direktoro de Panzhuhua-a Ŝtala Kompanio (Grupo) estas elektita kiel prezidanto de la komitato.

Nun rigardante malsupren de la monto, oni vidas, ke fore estas montoj sub blua ĉielo kaj blankaj nuboj, proksime domegoj staras inter arboj, zigzagas Jinsha-rivero kaj ĉie floras belaj kapokarboj.


## FACILA TRAFIKO

Qin Wanxiang, gvidanto de Panzhuhua, diris al mi: "Sen facilaj trafiko kaj telekomunikado, urbo restas izolita." Li venis el la Wuhan-a Ŝtala Kompanio en la 60-aj jaroj. Dum konstruado de la kompanio li loĝis en simpla adobodomo 20 jarojn. Li diris, ke la urbo, situanta en montaro kaj kanjono, antaŭe havis nur malmultajn loĝantojn, tie ne estis fervojo nek bona ŝoseo, kaj oni transportis nur per kamionoj, homaj ŝultroj kaj ŝarĝbrutoj. Post penado de

du generacioj, nun trajno atingas la lokon kaj per telefono oni povas kontakti la tutan mondon.

Panzhuhua estas trafika nodo ĉe la limlinio de Sichuan- kaj Yunnan-provincoj. La elektrizita Fervojo Chengkun kaj ŝtata ŝoseo n-ro 108 ligas ĝin kun la urboj Chengdu kaj Kunming. En la lastaj jaroj, sur Jinsha-rivero kaj Yalong-rivero oni finkonstruis 6 pontegojn, pli ol 20 mezgrandajn kaj malgrandajn pontojn. En la urbo estas trafika reto. Tie funkcias 119 miloj da telefonoj. La optika kablo, programrega transmisiono, cifera transmisiono, satelita telekomunikado, poŝtelefono, karta telefono k.a. kune efektivigis la lokan retan modernigon de komunikado. Dank' al ĉio ĉi Panzhuhua povas tre rapide interŝanĝi informojn kun la tuta mondo.

Nun tie civila flughaveno estas en streĉa konstruado. En 2015, kiam Panzhuhua celebros la 50-an datrevenon de sia naskiĝo, ĝi certe estos urbo pli bela kaj moderna. ■



La hidroelektraj Ertan

# Esperanto — spegulo de vivo

Interreto ebligis al esperantistoj oportune kunlabori en ĝi. Krom bulteno en papero, mi publikigas ĝin ankaŭ en interreto, ĉar mi kredas, ke en la interreta epoko elektronika gazeto altiros al si pli da legantoj

de ŜAŬKIO

**P**RI Esperanto oni scias, ke ĝi estas komunikilo por kultura interŝanĝo. Tamen por mi ĝi estas spegulo de vivo. Pere de Esperanto mi forskuis limigon de la lernejo, familio kaj fabriko kaj min dediĉis al la kolorriĉa vivosceno.

En 1979 mi legis anoncon de la Xinhua-a Koresponda Kurso de Esperanto pri varbado de lernantoj. Rakontoj pri Armand Su reaperis en mia memoro. En longa tempo Esperanto ne estis vaste konata de ĉinoj. Mi senhezite min anoncis. En oktobro, kiam mi ricevis la lernolibrojn, mi iom dubis, ĉu mi, mezaĝulo, povos ellerni la lingvon. Ĉiutage mi memlernis unu aŭ du lecionojn, kaj post malpli ol tri semajnoj mi finis ĉiujn lecionojn kaj povis reciti la lernitajn vortojn. Kiam mi ricevis sonbendon, mi jam povis kapti la sencon sur la sonbendo. Kaj tiam mi ekamis Esperanton.

En decembro, survoje al fabriko mi vidis anoncon de Lanzhou-a Esperanto-grupo pri okazigo de memorkunveno pri la kreinto de Esperanto, Zamenhof. Kun ĝojo mi partoprenis la kunvenon kaj amikiĝis kun esperantisto Lu Wanyi, de kiu mi pruntis multajn Esperantajn gazetojn kaj soife legis ilin. En sekvaj du jaroj mi verkis en Esperanto kaj interesiĝis pri Esperantaj poemoj kaj komencis esperantigi ĉinajn

antikvajn poemojn. Krome mi min proponis kiel redaktoron de la mimeografita Esperanta gazeto "La Vojo", vaste legata en Ĉinio.

En 1982, dank' al Lu Wanyi, Wang Yunxin kaj Zhang Fude fondiĝis la Lanzhou-a Esperanto-Asocio. Ni okazigis multajn kursojn de Esperanto, kuraĝigis junajn membrojn de la asocio aliĝi al progresiga kurso, Esperanta ĥoro kaj filatelo kaj propagando



La aŭtoro

de Esperanto sur stratoj. Niaj aktivadoj ricevis laŭdon de la Lanzhou-a Federacio de Soci-sciencaj Asocioj. En la aktivadoj mi amikiĝis kun multaj esperantistoj kaj riĉigis mian vivon. Por mi la jaro 1983 estas neforgesebla. Mi invitate partoprenis simpozion de Esperanto okazigitan en Wuxi, iniciatitan de la Huangshi-a Esperanto-Asocio. Kunvenis esperantistoj el Hubei, Jiangsu, Anhui kaj Pekino. Mi unuafoje spertis la atmosferon de Esperantujo. La bela prononco de Guo Zhu, la lerta lingvo-aplikado de Ikso kaj la flua interparolado de

Zensto kaj liaj junaj lernantoj forte impresis min. Mi ekkonsciis, ke Esperanto estas ne nur skriblingvo, sed ankaŭ parola lingvo. En la simpozio mi traktis teorian problemon de la Esperanta gramatiko kaj prezentis poemojn esperantigitajn de mi, kio vekis intereson de la ĉeestantoj.

En 1984 mi unuafoje kontaktis fremdlandajn esperantistojn. Tiam germanaj esperantistoj Vogelmann kaj Bayer vizitis la urbon Lanzhou. Reveninte la hejmlandon, s-ro Bayer sendis al mi kelkajn Esperantajn librojn, kaj s-ro Vogelmann abonis por mi "Monato" por unu jaro. Tiel mia vidkampo pli kaj pli vastiĝis. Estas bona ideo, ke esperantistoj raportu pri sia lando. Kiam mi vidis sur dorskovrilo de la gazeto karikaturon pri ĉina viro kun longa harligo, mi ege malĝojis: jam antaŭlonge forpasis la feŭda socio, kial en la okuloj de fremdlandanoj ĉinoj ankoraŭ estas tiaj! Do mi verkis kontribuaĵojn en Esperanto, kaj preskaŭ ĉiufoje mia kontribuaĵo estis publikigita. Mi esperis, ke pli da fremdlandanoj konos Ĉinion, kaj volis altiri ilin en Ĉinion. En 1986 okazis la 71-a UK en Ĉinio. Mi konigis Ĉinion al alilandaj partoprenantoj. Mi estis aktiva leganto. Mi uzis la honorarion por aboni "Monaton" ne nur por mi mem por sinsekvaj tri jaroj, sed ankaŭ por mia amiko aliprovinca por unu jaro.

La 71-a UK estas neforgesebla por mi. Esperantistoj el kelkdek landoj interparolis en Espe-

ra



ranto. Ĉu tio ne estas miraklo? En la kongreso mi renkontis Mori Singo kaj miajn aliajn korespond-amikojn. Tiam mi sentis, ke mi ne estas en mia lando, sed ekster ĝi kiel ĉina kultura sendito.

Esperantujo estas miniaturo de la mondo: Homoj kaj aferoj, bonaj kaj malbonaj, ĉiuj estas materialo por mia pripensado, per kiu mi ĝuste taksis min mem kaj difinis la direkton de mia vivovojo.

En la fino de la 80-aj jaroj kaj la komenco de la 90-aj jaroj, pro preforto el la laboro kaj familio, mi ne tiel aktive partoprenis Esperantajn aktivadojn kiel antaŭe, sed mi ankoraŭ priatentis la disvolviĝon de Esperanto-movado. Mi ne forgesis Esperantajn vortojn, kiuj jam enradikiĝis en mia kapo kaj en kiujn mi kunfandis mian amon kaj esperon. Kiam mi denove laboris en Guangdong-provinco kaj la loka Esperanto-Asocio petis min fariĝi denove ĝia membro, mi senhezite konsentis. Kun emociiĝo mi revenis en Esperantujon. La bona fundamento de la Guangdong-a Esperanto-movado havigis al mi bonan labormedion. Mi kontaktiĝis kun Guangdong-aj veteranaj esperantistoj: justa Dong Shiyang, lernema Ye Shuzi, mezaĝaj esperantistoj sindonemaj al Esperanto: Lin Liyuan, Li Weizhuo kaj Liu Weizhuang, kaj multaj junaj esperantistoj. Publikiĝis miaj nemalmultaj artikoloj, en kiuj mi prezentis mian opinion, ke se nur oni pli disvastigas kaj aplikas Esperanton, la ĉina Esperanto-movado povas disvolviĝi en ĝusta direkto. Krome, por disvastigi ĝin edukado kaj movado estas necesaj; kunlaborado enlanda kaj internacia akcelas aplikon de Esperanto, kaj en la informadika epoko Esperanto havas bonan perspektivon.

Ekde majo de 1997, laŭ mia propono, kantonaj esperantistoj organizas aktivadon ĉiumonate.



Kun e-isto el Germanio

Ili studas por altigi sian lingvonivelon. Tio allogas multajn membrojn. Iam partoprenis esperantistoj aliprovincaj kaj alilandaj. Por plimultigi komunikadon kun alilokaj esperantistoj, laŭ propono de s-ro Liu Weizhuang, mi kune kun Wu Hanping kaj Jian Weijian senpage redaktas la dulingvan bultenon "Agadu", subtenatan de legantoj per iliaj kontribuadoj kaj monhelpo. En la Kvara Ĉina Kongreso de Esperanto, okazinta en Guilin en 1999, niaj legantoj alte taksis la bultenon kaj fervore kuraĝigis nin, ĉar la bulteno komunikigis ilin kaj konigis al ni ilian malavaron. Ĝi ekscitis al ili fervoron por Esperanto.

Interreto ebligis al esperantistoj oportune kunlabori en ĝi. Krom bulteno en papero, mi publikigas ĝin ankaŭ en interreto, ĉar mi kredas, ke en la interreta epoko elektronika gazeto altiros al si pli da legantoj. Samtempe mi stariĝis hejmpaĝon de la Guangdong-a Esperanto-Asocio (<http://gdea.163.net>) kaj tiun de la Kantona Esperanto-Asocio (Agadu:<http://agadu.163.net>), kaj kunlaboris kun alilokaj esperantistoj en interreto.

En la Dua Azia Kongreso de

Esperanto okazinta en Hanojo en 1999, mi proponis, ke aziaj esperantistoj multigu komunikadon kaj kunlaboradon en interreto, kaj tio ricevis aprobon de s-ro Puramo Chong, prezidanto de KAEM, kaj japanaj esperantistoj.

Pro najbareco ni kaj esperantistoj de Hongkong havas intimajn rilatojn. En la lastaj du jaroj, por preparado de la 56-a Internacia Junulara Kongreso en aŭgusto 2000 en Hongkong, ni kaj Bill Mak, prezidanto de la Hongkong-a Junulara Asocio, multfoje renkontiĝis kaj kunvenis por interkonsiliĝo. Kiel LKK-ano, mi helpis ellabori programerojn kaj fari hejmpaĝon (<http://www.esperanto.org/ijk2000>). Ni faris transregionan kunlaboron inter Pekino, Hongkong kaj Kantono: sendi informojn kaj materialojn, kaj ankaŭ al ni ne mankas teknika subteno de membroj de JAM.

Lastatempe ni planis, ke esperantistoj el Hunan, Pekino kaj Hubei okazigos en aŭgusto 2000 en Changde la Internacian Simpozion de Verkado de Mao Zifu.

Per Esperanto ni kunlaboru, en Esperantujo ni rigardu la interesan mondon kaj per tio ni pliriĉigu nian vivon. ■

# Esperanto — ponto kaj ligilo inter la popoloj


de MAURICE SUJET (Francio)

**S**UR mia tablo kuŝas la iom flaviĝinta numero de EPCĈ, kiu portas la indikojn: vol.1 n-ro 1 maj. 1950... estos do baldaŭ tempo ĝoje festi la 50-jaran jubileon de via kara revuo. Certe ankaŭ viaj legantoj en la tuta mondo deziras celebri tiun eventon, ĉar via revuo, dum tiu duonjarcento, elstare kontribuis je diskonigado ambaŭ de Esperanto kaj de Ĉinio, kaj per via senlaca agado por ebligi pli bonan interkompreniĝon inter homoj vi helpis je nia komuna celo, kreo de pli paca mondo. Jam de via unua numero, en artikolo adresita "Al la legantoj" vi prezentis vian celon: "unuvoite ni faru Esperanton ponto kaj ligilo inter la popoloj". Tion vi faris.

La jaraj kolektoj de EPCĈ, kiujn mi zorge konservis kaj ofte uzis por informi ne-esperantistojn pri nia lingvo, estas apud mi kaj mi povas juĝi pri la pliboniĝo kaj moderniĝo de via revuo, kiu ofte spegulis la historion kaj la progresojn de via lando. Kia evoluo inter la 8-paĝaj gazetoj de la jaroj 1950 (8 numeroj) kaj 1951 (12 numeroj), kaj la dikaj modernaspektaj revuonumeroj de tiuj lastaj jaroj! Jam en la jaro 1952 EPCĈ fariĝis vera revuo kun kolora kovrilo kaj eĉ 4 paĝoj de fotoj nigrablankaj en la mezo. De tiam la progresoj evoluis paralele kun la progresoj de via lando, kelkfoje kun politikaj skuoj, kaj nun la revuo estas tiom belaspekta kaj interesa ke mi estas certa, ke en la tuta mondo esperantistoj fiere montras vian bele ilustritan revuon. Releginte kelkajn artikolojn, mi konstatas la bonan kvaliton de la lingvo kaj tiel vi helpis

esperantistojn pli bone koni nian lingvon. Ofte instruistoj pri Esperanto uzis viajn artikolojn por paroligi siajn lernantojn, kiuj samtempe lernis ion de via lando kaj edukiĝis je internacia sento. Ĉie en la mondo vi kontribuis je esperantiĝo de personoj, kiuj deziris komuniki en tuta egaleco kun homoj de malproksimaj landoj, aparte kun ĉinoj. Ekzistas en la mondo kelkaj revuoj, kiuj estis gravaj por la vivo de Esperanto, tucerte EPCĈ estis aparte grava kaj meritas lokon sur la unua vico de tiuj revuoj. Vi mem povas juĝi pri la fervoro de kelkaj el viaj legantoj en la kunveno, kiun vi organizas ĉiujare dum la Universala Kongreso de UEA.

Samtempe la legado de via revuo multe instruis min pri Ĉinio, pri ĝia antikva historio, pri ĝiaj eltrovaĵoj, kiuj kelkfoje atingis Eŭropon nur post longa tempo, kaj pri la vivo de la hanoj kaj de la 55 aliaj popoloj, kiuj vivas sur ĝia ampleksa teritorio. Tiuj konoj pri Ĉinio multe akriĝis mian deziron viziti vian landon kaj tion mi faris okaze de la Universala Kongreso en Pekino, de la Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao kaj de la Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo. Ĉiufoje mi povis viziti la historiajn lokojn, kiujn vi priskribis en via revuo: Pekino kaj la Granda Muro, kompreneble, sed ankaŭ Xi'an, Nankino, Wuhan, Luoyang, Kantono, Chengdu ktp. Mi povis ankaŭ ĝui la pitoreskajn lokojn kiel Guilin, Suzhou, Hangzhou kaj aliajn. Mi tiom ofte legis en via revuo la datojn de la fama Qin Shi Huang kaj de la famaj dinastioj Tang, Song kaj Ming, ke mi memoras ilin kaj tio fakte



La aŭtoro

multe helpas, kiam oni deziras koni la ĉinajn eventojn en la monda historio aŭ aprezi evoluon de la ĉinaj porcelanaĵoj. Miaj amikoj scias ke mi ankaŭ aparte interesiĝis pri la artikoloj, kiuj klarigis la evoluon de la ĉinaj ideogramoj, de la unuaj piktogramoj ĝis la modernaj simpligitaj ideogramoj. Viaj artikoloj pri la ĉina lingvo instigis min lerni kelkajn elementojn de ĝi, kaj dank' al tio miaj vizitoj en via lando fariĝis pli instruaj. Mi eĉ kuraĝis fari por esperantistoj prelegturneon pri Ĉinio, en Svedio en 1986, kaj ĉiufoje mi provis montri al interesita publiko la esencajn karakterojn de la ĉina skribo.

Sed en ĉiu numero de via revuo ni trovas ankaŭ eĉ de la diversaj Esperantaj kongresoj, de la eventoj de nia Esperanta mondo, kaj vi raportas pri la vizitoj de fremdlandaj esperantistoj al Ĉinio kaj de ĉinoj al eŭropaj landoj, ĉiam emfazante la amikajn rilatojn, kiuj instaligis inter la partoprenantoj. Vi tiel montras kiel Esperanto ebligas interkompreniĝon, reciprokajn estimon, kaj vi respektas la promeson de la unua numero "ni faru Esperanton ponto kaj ligilo inter la popoloj". Tiun etoson ni retrovas, kiam vi organizas la ĉiujaran kongresan kunvenon de viaj legantoj aŭ kiam, okaze de vizito al Pekino, vi invitas nin en vian EPCĈ-laborejon. Ni memoras kiel amike vi ĉiufoje akceptis nin en via rondo. Via revuo sendube impulsis kaj nutris la pacamajn idealojn de multaj el viaj legantoj.

toj.

Mi nun en mia memoro vidas la vizaĝojn de vi ĉiuj, kiuj kunlaboras je la preparo de EPĈ, sed mi ankoraŭ rememoras la vizaĝojn de tiuj, kiuj emeritiĝis aŭ kiuj bedaŭrinde malaperis el nia mondo... Miaj pensoj iras danke al ili.

Permesu al mi honori aparte mian amikon Ivan Ko, vian

emeritan kolegon, kun kiu mi konatiĝis jam en 1979 dum la UK en Lucerno. De vizito al vizito, kun evoluo de la ĉina vivo, mi pli bone konis lin kaj lian familion, kaj li fariĝis por mi bildo de via revuo kaj de Ĉinio. Lia interesa konversacio, lia konstanta afableco kaj modesteco, agrable impresis min kaj mi deziras al li bonan sanon kaj plej

trankvilajn tagojn meze de lia kara familio.

Havu ĝojan jubileon, rikoltu la merititajn dankojn de la tuta esperantistaro kaj trovu en tio novan energion por daŭrigi vian valoran laboron profite, kiel ĝis nun, je Esperanto, je Ĉinio kaj entute por paco en la mondo.

Vivu Esperanto kaj "El Popola Ĉinio"!

# La kvina suno

de FIDEL FIGUEROA M.  
(Meksikio)

**K**VINDEK jaroj! Kvindek volumoj de "El Popola Ĉinio"!

Kvindek Epokoj! Kvin Aĝoj aŭ kvin Sunoj, laŭ esprimo de la antikvaj meksikanoj.

Efektive, ja tiel povas esti konceptata la supre dirita fakto, ĉar la meksikaj indiĝenoj post multaj centjaraj observoj konjektis, ke antaŭ la nuna epoko jam ekzistis kvar teraj aĝoj, kvar Sunoj, en kiuj sinsekve okazadis certa evoluo; tio devenigis ĉiam pli bonajn formojn. La eminenta meksika historiisto Miguel Leon Portilla diris, ke estas kurioza koincido kun la klasika penso de Okcidento kaj Azio, ke la kvar fundamentaj fortoj: akvo, tero, fajro kaj vento regadis tiujn aĝojn aŭ sunojn. Laŭ onidiro, nuntempe ni vivas sub la Kvina

Suno aŭ la Suno de Movado.

Do, jen la tempodaŭroj! Jen la amaso da informoj kaj scioj pri la antikva kaj nova Ĉinio; ĉio ĉi tio venas pliriĉigi la Esperantan kulturon.

En 1954, kiam EPĈ ankoraŭ ne atingis kvin jarojn, mi havis la eblecon akiri preskaŭ ĝis tiam plenan kompletan de la revuo. — Unua Suno, Suno de Tigro.

Nia revuo poste fariĝis: Dumonata kultura gazeto eldonata de la Ĉina Esperanto-Ligo. Do, ĉu la Dua Suno, Suno de Vento?

Kaj en 1967, kiam la peranto estis Esperanto-Meksika Asocio, ĝi denove fariĝis monata gazeto. — Tria Suno, Suno de Fajro-Pluvo, epoko dum kiu la vulkanoj kovris per lafo kaj cindro la kamparojn.

Laŭ la indiĝena mito pri la kvin sunoj, la Kvara Epoko, Suno de Akvo, estus precipe karakterizita per tio, ke fortaj ŝtormoj kaj pluvegoj kovris la plej altajn

montojn.

Tamen ja feliĉe, kaj kiel la proverbo diras:

Post la tempesto venas senventa kvieto.

Kaj tiel, la humida tero sunumita de la Kvina Suno, la Suno de Movado. Nuntempe ni vivas, nepre reverdiĝis kaj bunte ekfloris. Tiele oni povas konstati en la sekvantaj numeroj de EPĈ, ekde la 80-aj jaroj. Inter aliaj, estas menciindaj la n-ro 7, 1987, kies kovrilo montras la verkon de Ŝa Gengŝi titolitan "Neĝlotusoj", kaj la n-ro 11, 1986, kie kulmine oni priskribas la disvolviĝon de la 71-a UK!

Akompanu nin! Plikreskigu la maturantan brilon de nia Kvina Suno, la Suno de Movado!... Ja nepre: la Suno de la Esperanta Movado.



La aŭtoro



Jarkolektoj de EPĈ konservataj de s-ro Fidel Figueroa M.

# Somera lotusfloro

de LU JIXIN (Ĉinio)


## SOMERA LOTUSFLORO

*Lage, ombros nigra verdo,  
Naĝas nuboj kun leĝer' do.*

*Sur la nuboj vi aperas  
Honte diskrete belas.*

*Rond-folien bela volo  
Perlas kristale el koro.*

*Inter perloj vi kvietas  
En somera sonĝ' ridetas.*



## SONĜO SOMERA

*Ĉu el for', ĉu el kor'  
Venas sorĉa ruĝ'-fervor'.*

*Plumba griz', morna plis',  
Svenas sub la civiliz'.*

*Viv-favor', bela hor'.  
Ĉarme ride freŝa flor'.*

*Per la bel', per la hel',  
Levas sonĝon el fabel'.*

## AŬRORE DE LAGETO

*Aŭrore karesas zefiro rondela..  
La lotusfolioj rondiĝaj finfine  
Jam levas fieron, sed ne la sinkline  
Volviĝan ĉagrenon sub varmo somera.*

*Favore alvenas do pluvo tenera,  
Kaj ranan kvakadon eltiras destine,  
Sed tuje hasteme foriras rutine  
Al la horizonto nubaro leĝera.*

*Folioj ekstremas kun freŝa kostumo,  
El kio falantaj kristalaj akv-perloj  
Resalte koloras someron berila..*

*Ridete sin verŝas ora matenlumo  
Sur lago ondeta, sub verdaj ombreloj  
Leviĝas torĉetoj kun flamo sopira..*

## LA LASTA PETALO

*Jam oris gracion sunlum' en vespero  
Ankaŭ vian volon sen hasta disiĝo.  
La lasta petalo tremas kun espero:  
"Ĝis! Ĝis la venonta somer'..."*

*Hazarda renkonto, hela akvarelo.  
Tamen kiel sombras kaj palas disiĝo  
La lasta petalo, adiaŭa kvero:  
"Ĝis! Ĝis la venonta somer'..."*




## RIDETO NE FORGESINDA

*Eble longe vi aspiris kun pasio,  
Sed belan atendon debatis pluv-svarmo.  
Falintajn petalojn subtenas folio,  
Kaj vian ĉagrenon pro velkema ĉarmo.*

*Eble longe mi vadadis kun ario,  
Zefiro min tiris al renkonta karmo.  
Sur akvo do flosas mia emocio  
Ankaŭ memriproĉo pro lanto en kalmo.*

*La lasta petalo kun belo senŝminka  
Samkiel okulo kun pura sincero,  
Kvazaŭ sorĉa lipo elsendas parolon.*

*Jen estas rideto ja ne forgesinda!  
Mi longe rigardas vin en ĉi vespero  
Kaj fotas l' aroman animon per koro.*



# Viva fosilio — ornitorinko

**A**ŬSTRALIANO kunportis specimenon de stranga besto alilanden en 1880.

La specimeno longis ĉ. 60 cm. kun palmpiedoj, plata beko, simila al tiu de anaso, kaj densa hararo, simila al tiu de mambesto. En ĝia malantaŭa parto estas truo de kloako, kio montras, ke ĝi demetas ovojn.

Komence zoologoj koleriĝis, ke tio estas simpla trompo, ĉar laŭ ili tio estas specimeno kunmetita el korpopartoj de diversaj bestoj. Sed post atenta observado, ili trovis neniun postsignon de gluado. Al kiu kategorio do devas aparteni ĝi, ne birdo, nek besto. Post plurjara esplorado oni fine venis al la konkludo, ke ĝi devas esti mamulo, kaj laŭ la aspekto oni nomas ĝin ornitorinko.

Tio estas stranga besto aŭstralia. Dank' al siaj du paroj da palmpiedoj ĝi povas naĝi en akvo, rampi sur la tero kaj fari neston. En akvo ĝi movas sin per la antaŭaj piedoj kaj tenas sin en ekvilibro per la postaj piedoj. Dum naĝado ĝi ritme skuas sian kapon dekstren kaj maldekstren. Ĝenerale ĝi povas naĝi subakve


20-30 sekundojn, sed ĝi povas sin kaŝi sub la akvo plurajn minutojn pro surprizo. Ĝi povas elmeti ovojn kiel rampulo kaj kovi ilin kiel birdo. Samkiel mamulo, ĝi nutras idojn per lakto. Unuvorte, ĝi havas la fiziologiajn trajtojn ne nur de rampulo sed ankaŭ de birdo kaj besto.

Ornitorinkoj manĝas ĉefe vermojn, akvajn insektojn kaj limakojn. Ili manĝas kaj samtempe fekas. Ĝuste pro tio ili estas tre okupataj de mateno ĝis vespero por serĉi nutraĵojn.

La viraj ornitorinkoj longas ĉ. 60 cm. kaj la inaj — 45 cm.

Ĉiujare ili demetas unufoje po du ovojn, grandajn kiel pasera ovo, kun iom malmola ŝelo. La idoj estas mamnutrataj.

Ornitorinkoj vivis de antaŭ milionoj da jaroj. Sciencistoj nomas ilin vivaj fosilioj sur la tero. Oni provis enkonduki ilin en aliajn landojn, sed malsukcesis. De tio vidiĝis, ke sur nia vasta terglobo nur Aŭstralio estas ideala loko por ili. Interesa temo restas por sciencistoj, kial la ornitorinkoj postvivis gravajn transformiĝojn de la tero dum milionoj da jaroj kaj vivas ekskluzive sur la "suda kontinento". ■



## ĈINIO

● La Huangshi-a E-Asocio de Hubei-provinco lanĉis en 1999 la aktivadon "Transjarcenta vojaĝo — piediri tra la nova eŭrazia ponto". Ĝis la fino de la jaro la piedira teamo finis la vojaĝon en Ĉinio longan je 4 131 km. En la 4-a de aprilo 2000 kvar membroj de la teamo ellandiĝis tra Alataw-montpasejo en Xinjiang kaj eniris en Kazahstanon.

(Wei Guangliang)

● Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de marŝalo Nie Rongzhen (1899.12.29-1992.05.14), fama milita strategiisto kaj fervora Esperanto-subtenanto, la Ŝtata Poŝta Buroo de Ĉinio emisiis memorigan poŝtmarkoserion en la 29-a de decembro 1999. En la emisia tago la Pekina Xiqu-a Poŝtmarka Kompanio uzis memorigan poŝtstampilon kun vortoj en Esperanto kaj la ĉina lingvo kaj eldonis kune kun la ĉina societo "Amikoj de Esperanto" unuatagan koverton kun ĉinaj vortoj skribitaj de Nie Rongzhen okaze de la 130-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof kaj ilia Esperanta traduko: "Lernu Esperanton por akceli amikecon inter popoloj kaj la mondpacon!" La desegnintoj de la poŝtstampilo kaj unuataga koverto estas Xie Shaoxing kaj Tan Ailing.

(Qin Kaiji)

## ĈEĤIO

● La 48-a Somera Esperanto-Tendaro okazos en tri etapoj: 2-15/7.2000; 16-29/7.2000; 30/7-12/8.2000, en la tradicia loko ĉe la digolago de Vranov, apud la vilaĝo Lancov, distrikto Znojmo, en suda Moravio. La instruado de Esperanto okazos ĉiutage, escepte de dimanĉo, de la 8-a ĝis la 12-a horo en tri diversgradaj kursoj: A — por komencantoj; B — por progresintoj; C — konversacia. Klubo de Esperanto kaj mondaj lingvoj, CZ-674 01 Trebic, Ĉeĥio.

(Drahomir Kocvara)

## ISRAELO

● La oficiala antaŭkongreso de la 85-a UK okazos de la 22-a ĝis la 25-a de julio 2000 en Amano, Jordanujo. La antaŭkongreso konsistas el tri sendependaj sed kunligitaj eroj: tradicia antaŭkongreso; renkontiĝo por arabaj esperantistoj en Amano, al kiu aliĝos la antaŭkongresanoj; seminario en la israela vilaĝo nomata "Pac-oazo", kiu konsistas el miksita, juda-araba loĝantaro kaj specialiĝas pri problemoj de paco kaj kunvivado en la Meza Oriento. De tie oni komune veturos al la Universala Kongreso. Se vi deziras aliĝi al unu el la tri eroj kaj ricevi la definitivajn detalojn, bonvolu kontakti la Araban Komisionon, ĉe Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italujo. [corsetti@itelcad.it](mailto:corsetti@itelcad.it) aŭ la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, tel. +31-10-436 1044, faksilo: +31-10-436-1751, rete: [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

(Renato Corsetti)

## MAKEDONIO

● La Junulara Esperanto-societo "Estonto" el urbo Prilep, Respubliko Makedonio, la 26-an de marto 2000



E-istoj de "Estonto"

festis sian 5-an datrevenon kun kelkaj manifestacioj. Unue la societo preparis ekspozicion kun fotoj kaj aliaj esperantaĵoj kaj materialoj de sia E-movado. Krom tio, en solena vespero ĝi prezentis makedonan poezion en Esperanto, surbendigitan al ĝia nova (dua) kompaktdisko, eldonita honore al ĝia 5-a datreveno.

(Metodija Galeski)

## SERBIO

● La Forumo de Neregistara Organizo (NRO) en Banja Luko organizis la Unuan Foiro de NRO en Banja Luko inter 1-3-a de februaro 2000. Ĉe la Foiro prezentis 36 neregistaraj organizoj, inter kiuj estis ankaŭ du esperantistaj: E-ligo de R. Srpska kaj E-societo "La mondo". Dum la Foiro estas okazigitaj rondtabloj ligitaj al NRO kaj prezentiĝo de membro-organizaĵoj de la Forumo. Prezidanto de E-ligo s-ro Mico Vrhovac kaj prezidantino de E-societo "La mondo" f-ino Mira Makivic faris publikan prelegon en foirejo (Artgalerio) pri Esperanto kaj E-organizaĵoj en Respubliko Srpska kaj en la mondo. La prelegoj kaj prezentiĝoj estis vaste vizitataj kaj



E-istan standon vizitas s-ro Mihojlo Crnadak (la 2-a de dekstre), urbestro de Banja Luko

ankaŭ akompanataj flanke de amaskomunikiloj (Gazetoj, radiostacioj kaj TV). Tiel la ŝtatgazeto "Voĉo Serba" (Glas Srpski) publikigis ioman tekston pri Esperanto kaj organizaĵoj, dum Radio Balkan publikigis gravajn partojn el la menciita prelego pri Esperanto. Menciindas ke nia veterano, ankaŭ tre aktiva membro, sinjoro Vukasin Cutic (vicprezidanto de E-societo "La mondo") ĉiutage dum la Foiro deĵoris paralele kun la ordinaraj deĵorantoj, donante en ĉiu grava momento al interesiĝantoj tre klarajn kaj kompletajn informojn. Niaj du E-organizaĵoj ricevis du diplomojn kiel kunfondintoj de la Unua Foiro de NRO por la regiono Banja Luko.

(Mico Vrhovac)



Ĉe strato  
de Li Xuanting (13-jara knabino)

# “Mi pentras Eŭropon”

de TAO TAO

**T**IO estis speciala vojaĝo. 17 lernantoj, 6-13-jaraj, sub la gvido de du belartaj instruistoj vizitis 8 eŭropajn landojn por pentrado. La landoj kaj vidindaĵoj en la okuloj de la geknaboj estis tiaj, kiajn ili pentris

ame, emocie kaj romantike.

Sube estas vojaĝnotoj, kiuj plenas de naivaj vortoj, tamen impresas plenaĝulojn pri la fremda Eŭropo.

**Dong Yichen** (6-jara knabino):

Ni venis al la Granda Kanjono de Luksemburgo kaj

renkontis dikan instruistinon kun viglaj kaj amindaj geknaboj. Mi pensis, ke ili estas turistoj el alia lando. Mi volis paroli kun ili. Bedaŭrinde, mi ne konis ilian lingvon. Mi volis inviti ilin viziti Ĉinion, ĉar ankaŭ Ĉinio estas bela.

**Zhu Xinya** (7-jara knabo):

Estas neforgeseble, ke mi vizitis Nederlandon. Tiutage mi estis pentranta grandan ventmuelilon, sed subite pluvegis. Mi ektemis de malvarma vento. Poste la pluvo falis pli kaj pli forte. Mi devis kaŝi min en fromaĝo-farejo. Laŭdire estis 40°C en Pekino en la sama tago.

**Chen Xiaojia** (10-jara knabino):

Matene ni atingis la faman Triumfarkon en Parizo kaj preparis nin por fari la unuan pentraĵon en Eŭropo. Baldaŭ malantaŭ nin venis multaj turistoj, kiuj diskutis pri nia pentrado kaj laŭdis nin starigante dikfingron. Du francoj volis aĉeti niajn pentraĵojn kontraŭ 1 000 frankoj, sed ni ne konsentis. Plenuminte la pentradon, ni kiel herooj adiaŭis la Triumfarkon.

Flustro de laktbovinoj de Li Xuanting





Katedralo de Koln ĉe Rejno  
de Yu Lan (9-jara knabino)

**Xiao Xiao** (10-jara knabo):

Sur la placo antaŭ la urbodomo de Florenco mi vidis multe da groteskaj modernaj skulptaĵoj: patrino kun filo, viro sur ĉevalo, bestoj... Ili havas dikajn membrojn kaj malgrandan kapon. Poste mi sciis, ke lupeo inspiris la skulptintojn.

\* \* \*


Antaŭ nelonge okazis en Pekino la ekspozicio de pentraĵoj "Mi pentras Eŭropon". Oni ekspoziciis 125 el la pli ol 300 pentraĵoj de la geknaboj.

Ĉi tie ni publikigas kelkajn el ili pri pejzaĝoj bone konataj, sed la malgrandaj aŭtoroj per sia peniko donis al Eŭropo novan aspekton. ■



Statuo de militisto  
de Sun Moqing  
(9-jara knabo)

3-jara knabino)



于荷兰风车村





Statuoj en Romo  
de Wang Nan (11-jara knabino)

Vidaĵo de Venecio  
de Xiao Xiao (10-jara knabo)



自漢99年  
@行旅大划  
威尼斯



Ĉapo de fromaĝo-vendistino  
de Chen Xiaojia (10-jara knabino)

Belaj domoj  
de Dong Yichen  
(6-jara knabino)

Preĝejo  
de Sun Moqing (9-jara knabo)



# Amo al Engebei



Teksto kaj fotoj de DA WEI

En Engebei de Kubuĝi-dezerto, Interna Mongolio de Ĉinio, estas du sablo-regaj ekspertoj, nome Wang Minghai el Ĉinio kaj Toyama Masahide el Japanio. Oni respektas ilin pro tio, ke ili konstruis oazon en la dezerto dum la pasintaj 10 jaroj. Sekve la Ĉina Junulara Fonduso kaj japana popola amikeca organizo komune lanĉis la "Verdan espero-projekton — ĉina-japanan amikecan agadon por verdigi dezerton".

Nun Engebei havas densajn arbedarojn, vicajn da arbetoj, artefaritajn lagojn kaj domojn el ruĝaj brikoj, kiuj donis al la dezerto vivecon. La 15-an de aŭgusto 1999, pli ol 200 volontuloj el Ĉinio kaj Japanio venis tien de Pekino. Ili plantis verdan esperon en la varmega dezerto.

Poste sekvos pli da volontuloj por verdigi la dezerton.



S-ro Toyama Masahide kaj lia statuo starigita de Engebei-anoj



Ĉinaj kaj japanaj junuloj kune plantas arbidojn.





Japanaj  
volontuloj  
energie  
laborantaj



Reforma sablofiksa forstozono



Transportado de arbidoj



"Prenu laborilon!"

Sablofiksa forstozono

Volontuloj antaŭ ekiro por verdigi la dezerton

友好沙漠緑化の集い  
一九九九年八月記念





Marŝo en la dezerto



Sindediĉema familio



Strutoj ĉe akvo

# Vestoj de taĝikoj

Fotoj de LIU SIGONG


La ĉinaj taĝikoj vivas sur la Pamira Altebenaĵo en la okcidento de la Xin-jiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kaj ilia totala nombro estas 27 000. Same kiel aliaj nacimalplimulto, ankaŭ la taĝikoj havas siajn proprajn naciajn vestojn.

Kutime la viroj portas sur si longan senkoluman kaj zonitan jakon kun butonaro en la mezo de la brusto. En malvarma sezono ili aldonas ŝafpelton ekster la jako. Ili portas cilindran ĉapon el nigra veluro, kaj la rando de la ĉapo povas esti mallekata malsupren por ŝirmi la orelojn kaj vangojn kontraŭ frosto. La virinoj portas sur si robon, kaj sinjorinoj — post-tukon kaj rondan broditan ĉapon kun arĝentaj ornamaĵoj. Kiam ili

vizitas alian lokon, ili devas kovri la ĉapon per tuko. Ĉiuj viroj kaj virinoj portas sur si feltajn ŝtrumpojn kaj molajn ŝafledajn botojn kun plandumoj el poefaga ledo. Tiaj ŝuoj estas taŭgaj por irado en montoj. En la lastaj jaroj la viroj vestas sin ankaŭ per eŭropstila kostumo.




Molaj ŝafledaj botoj



Maljunulo kun kapornamo

Knabo en nacia vesto



Al lernejo






Renkontiĝo survoje




Fratinoj



Maljunaj taĝikoj



Antaŭ edziniĝo





Junaj taĝikoj



Junulino kun kapornamo



Virinoj kaj infanoj en naciaj vestoj

# La lastaj arbohakistoj

En nordorienta Ĉinio estas loko nomata Dahailin. Longan vintron akompanas dika tavolo da neĝo kaj la temperaturo falas ĝis 30 gradoj sub la nulo. Sed la naturo ne faris la lokon senviva, kaj tie prosperas arbaro kun plej bonaj nordaj arboj: koreaj pinoj, blankaj pinoj, piceoj, abioj, betuloj...

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de LIU SIGONG

**A**NTAŬ 400 jaroj en tiu arbaro viglis sovaĝaj bestoj kaj preskaŭ ne estis homa spuro kaj tien la kortego ekzilis malliberulojn. Poste tien de tempo al tempo fuĝis malriĉuloj el aliaj provincoj, kaj tien venis ankaŭ homoj el lim-regionoj por ĉasi bestojn, haki arbojn, karbigi lignon kaj kolekti ginsengojn aŭ kuracherbojn. Generale ili venis printempe kaj foriris aŭtune aŭ inverse. Sed la veraj "indiĝenoj" estas arbohakistoj de la forstokultura buroo Dahailin, kiuj enmigris el la Centra Ebenaĵo de Ĉinio antaŭ 50 jaroj, kiam la lando bezonis prosperiĝon en forstokulturo. Kiel la unuaj arbohakistoj de la nova Ĉinio, ili sindoneme laboradis por liveri lignon al proksimaj kaj malproksimaj provincoj. Poste ili transdonis la hakilon kaj segilon al siaj posteuloj. Kion faras hodiaŭ la sekvantoj? Kaj kiel statas nun Dahailin?

## ENIRI EN ARBARON

El inter la branĉaroj de la arboj tralikiĝas kolonetoj da sunbrilo, kaj irante en la arbaro, mi povis vidi tra la foliaroj bluan firmamenton kaj blankajn nuboflokojn.

Iom post iom mi estis kaptita de obtuza kaj mistera sonondo. Kiel ruliĝanta ondo, la animskua, sufoketa kaj malproksimatinga muĝado venis ŝajne el sub la tero, aŭ de la firmamento. Tio estis muĝado de pinaro. Mi sentis, ke ĉiu arbo estis kantanta por la vivo. Oni diris, ke kiam arbo



Kabanoj en arbohakejo

falas pro rompiĝo, ĝia radiko dolore krakas. Tio estas ĝia cigna kanto. Ĝia falo estigas tondran bruegon en la montaro.

Mi ne vidis la tragikan scenon. La arbaro estis en ripozo. Sur la neĝo estis spuroj de bestoj. Foje kaj foje oni povis aŭdi falon de neĝo de sur branĉoj. Vojgvidanto diris al mi: "Ne timu. Nun la ursoj vintrodormas en arbotruo aŭ rokfendo. Tamen tiuj, kiuj ne vintrodormas, estas maljunaj ursoj altaj kaj atakemaj. Sed ili ne kutimas ataki homojn, se ili ne estis atakitaj de la lastaj."

Blanka ĉevalo lante alvenis tirante trunkon. Por fuĝi de laboro, ĝi elŝteliĝis tra drata barilo. Se oni perdos la vojon, oni povos sekvi ĝin, kaj ĝi kondukos lin al la kabano de arbohakistoj...

## VIVO EN ARBARO

La kabano sidas apud

glaciiginta rivero en la arbaro. Sub la tegmenta alero pendas vico da longaj pendoglacioj. Kiam ni puŝmalfermis la pordon de la kabano, blanka nebulo ruliĝis el la domo. En la kabano estis malhele, sed varme. 7-8 paroj da malsekaj ŝuoj estis sekigataj ĉe la forno. Kelke da mezaĝaj viroj estis drinkantaj sidante ĉirkaŭ tableto sur terlito. Tie estis granda pelvo kun supo el rafano kaj tohuo kaj ankaŭ korbo kun grandaj vaporumitaj farunaĵoj. Ĉiuj drinkis el ladbotoj, kaj la almanĝaĵo estis nur nerostitaj arakidaj grajnoj. Sed ĉiuj estis kontentaj pro la ĝuo. S-ro Wang, ruĝiginta pro la vino, diris al ni, ke arbohakistoj drinkas ĉe ĉiu manĝo, kaj la vino estas maceraĵo el diversaj drogoj, kiu povas malstreĉi la muskolojn, vigligi la sangocirkuladon, forigi malvarmon kaj mildigi doloron. Tio estas sperto heredita de la antaŭuloj. Kiam la arbohakistoj



Patrolantoj

Foto de GUO CHUNQING

soifis dum laborado en la arbaro, ili englutis neĝbuleton; kiam ili malsatiĝis, ili enpikis vergeton en bulojn el maiza faruno kaj rostis ilin sur fajro; kiam la buloj krustiĝis, ili manĝis ilin, kvankam ilia interno ankoraŭ estis glacia. Post certa tempo preskaŭ ĉiuj arbohakistoj eksuferis de stomaka malsano. Krome en la arbaro estis humide, kaj ili sentis doloron ĉe la talio kaj artikoj. Sed la arbaro estis tre amika al ili, ke tie kreskas diversaj kuracherboj...

S-ro Wang havis 50 jarojn. Li estis nomata de la kolegoj "Frato", kaj la junuloj nomas lin "Onklo". Li longe loĝis en la kabano kaj prenis ĝin sia hejmo. Ili prizorgis unu alian kaj interrilatis kiel patro kun filo aŭ frato kun frato. Ili estis gajaj kaj ŝercemaj, kaj pro tio ili facile moderigis sian laciĝon kaj enuon, sed la vino-maceraĵo ne donis tian efikon. En la malfacilaj cirkonstancoj harmonio estis tre grava, alie ili ne povus movi pezegajn trunkojn. Ajna neglekto kaŭzus sangan akcidenton. La nepre necesa solidareco transformiĝis en animitan "ruk, ho ruk". En kuna ruk-krio ĉiuj paŝis en strikta takto. Poste maŝina transportado anstataŭis la homan transportadon, kaj oni jam ne bezonis krii "ruk ho ruk", sed la animo de "ruk ho ruk" daŭris. Kaj nun oni bezonas alian krion: Kiam la hakita arbo estas falonta, oni devas laŭte krii trifoje en direkto de tiu arbo, por ke la kamaradoj sin gardu kontraŭ ĝia

falo. Ili plej timis, ke la hakita arbo ne falos, sed rekte staros kiel antaŭe; ĝi povos fali en ajna momento, se ventos. Kaj tiam kriego jam neniom helpos. Alia danĝera afero estas, ke la falinta arbo resaltos kunpuŝiĝante kun

la tero. Ambaŭ estis vunditaj — kaj la homoj kaj la arbaro estis sangantaj. La koro de la viroj sangis kaj ili montris pli grandan respekton kaj timon al la arbaro. Do ĉiufoje, antaŭ la komenco de arbohakado oni devis fari kulton al la monto kaj arbaro. Ĉio tio jam forpasis. Tamen nun, irante en la arbaro, oni ne facilanime sidis sur stumpoj de la hakitaj arboj aŭ tretis ilin, ŝajne por ne ofendi dion.

Ĉu la naturo pardonos ilin?

## DOMAĜI ĈIUN COLON DA LIGNO

Elĉerpiĝas la fuelo, kaj la homa ekzisto alfrontas krizon. Tio ne estas venĝo de la naturo, sed signalo de kuna pereado de la homoj kaj la naturo. Fakte antaŭlonge la malbona aŭguro jam aperis. Antaŭe altaj arboj skrapis la ĉielon kaj kreskis unu apud alia en interspaco de malpli ol unu futo. Sed poste la registaro de Qing-dinastio (1644-1911) praktikis la politikon de "transloĝigo kaj landlima kulturado", ke la arbaroj malvastiĝis tago post tago kaj rapide retiriĝis ilia rando. Nun maltrankvilo de la loĝantoj de Dahailin jam superis la antaŭan determinismon. Ili pentis post longa meditado, ke ili tro pagis el la estonta enspezo. Kaj nun ili domaĝas ĉiun colon da ligno.

En la arbohakejo Taipinggou ni renkontis gvidantojn pli altrangajn ol tiuj de la arbohakejo. Ili venis ekzameni la "ripozigon"

de la arbaro. S-ro Sun Shouxi, respondeculo de la arbohakejo, konigis al ni, ke la denseco de la arbaro devas havi racian gradon konforman al la ekologia bezono de la kreskado de la arboj. Troa denseco malhelpas tralikiĝon de sunradioj kaj perdigas al la grundo fekundecon, sekve la arboj ne povas bone kreski. Sed ankaŭ troa maldenseco pro malracia hakado estas malutila, ĉar en tro granda spaco la arboj multe disbranĉiĝos, la arbotrunkoj ricevos tro da cikatroj post forhako de la branĉoj kaj la trunkoj fariĝos malbonkvalitaj. Kaj cetere, maldensa arbaro estas facile detruata de ventego. Sola arbo malfacile daŭre vivas pro tio, ke ĝi perdas la necesan medion. Kaj nun la tasko estas bone prizorgi la ekologiajn arbarojn kaj praktiki racian hakadon en porkomercaj arbaroj. Pro tio ĉiuj arboj estis numeritaj, por ke la arbaroj povu ekzisti por ĉiam kaj esti senĉese utiligataj de la homoj.

Hakante arbojn, la arbohakistoj detale kalkulis ĉiun colon da ligno. Antaŭ dekoj da jaroj la stumpoj altis 80 cm., sed nun apenaŭ 10 cm. En neĝa vintro oni devas forŝovi neĝon pli ol unu metron dikan por segi la arbon kiel eble plej malsupre de la trunko. Antaŭe oni forhakis la pinton de la trunko je la loko kun diametro de 30 cm., kaj nun je la loko kun tiu de 3 cm. Ankaŭ la velkintaj kaj ventorompitaj arboj, la pintoj de la trunkoj kaj la dikaj branĉoj estas utiligataj. Kaj en transportado oni denove uzas brutojn anstataŭ traktoroj. Esplorado montras, ke traktora transportado 3.8-oble pli multe damaĝas la arbojn ol bruta transportado, ĉar por ĉiu centa metro de la traktora vojo oni detruas 19 arbojn.

Alia respondeculo Sun diris, ke antaŭe ili strebis havi multe da greno kaj neniam atendis, ke ili suferos de malsato, kaj mankas

(Daŭrigo sur p. 49)

# La lastaj arbohakistoj




Koreaj pinoj



Kultivejo de koreaj pinoj  
Foto de SHI GUANGMING






Arbaro en neĝo



Arbohakistoj farigis arboplantistoj.  
Foto de SHEN GUANGCHUN



Antikvaj arboj  
deiskrapantaj

# La lastaj arbohakistoj



Arbohakistoj

Transportado de ligno




Labor-paŭzo







En arbohakejo



Antaŭ laboro



Ĉizado de porcelanaj floroj

# Porcelanaĵoj

Teksto kaj fotoj de WANG ENPU

La urbeto Fengxi estas porcelanaĵa produktejo en Chaozhou, suda Ĉinio. Jam antaŭ 1 200 jaroj oni komencis baki tie porcelanaĵojn. Nun tie estas 20 grandaj fabrikoj de porcelanaĵoj kaj dekoj da privataj metiejoj. Ili produktas pli ol 6 000 specojn da porcelanaĵoj.

El la porcelanaĵoj produktitaj en Fengxi la plej famaj estas la metiartaj. Ili estas delikataj, fajnaj kaj rafinitaj kun apartaj artaj trajtoj. Inter ili estas florbazo kun plene ĉizitaj floroj kaj altnivelaj porcelanaj floroj, en alteco de kelkaj centimetroj ĝis 1.5 metroj, kaj statuoj de diverspozaj belulinoj, feoj, birdoj kaj bestoj.

La porcelanaj floroj kaj boteloj estas majstroverko de Fengxi-aj bakuloj. Tiu eminenta tradicia ĉina popola arto certe disvolviĝos generacion post generacio.

Artisma kolorigado




En la Fengxi-  
Porcelanaĵa  
Fabriko



# de Fengxi



Klientoj



Glazurado de  
1.5-metre alta  
porcelana  
florvazo



Vendejo de porcelanaĵoj

# La origino de la ĉina civilizacio

S-ro Chen diris al ni, ke ili decidis fari la filmon kun la celo atesti, ke la historio de la ĉina civilizacio estas pli longa ol 5 000 jaroj

de HANG JUN

**L**A Ĉina Centra Televizio kaj la Ĉina Ŝtata Buroo pri Historiaj Restaĵoj kune faras grandskalan dokumentan filmserion "La Ĉina Civilizacio". Nun jam estas finita la unua parto de tiu ĉi filmo sub la titolo "La Origino". Provprojekcio en malgranda sfero pruvis, ke ĝi estas brila filmo. Por koni la enhavon kaj trajtojn de la filmo, ni intervjuis s-ron Chen Jianjun, scenaristo-reĝisoron de la filmo.

S-ro Chen estas juna, sagaca kaj talenta. Li konigis al ni:

"La ĉina civilizacio havas longan historion. Laŭ ĝenerala opinio, ĝi havas la historion almenaŭ de 5 000 jaroj, sed iuj ne rekonis tion, opiniante, ke ĝi havas la historion nur de 3 000 jaroj, kaj aliaj persistis en monismo, agnoskante, ke nur la Flava Rivero estas la lulilo de la ĉina civilizacio, neante tion, ke ankaŭ Yangzi-rivero kaj aliaj regionoj de Ĉinio generis la ĉinan civilizacion. Eĉ troviĝis tiuj personoj, kiuj opiniis, ke la ĉina civilizacio estas enkondukita el Okcidento. Do kie estas la fonto de la ĉina civilizacio?"

S-ro Chen diris al ni, ke ili decidis fari la filmon kun la celo atesti, ke la historio de la ĉina civilizacio estas pli longa ol 5 mil jaroj kaj ne nur la Flava Rivero, sed ankaŭ Yangzi-rivero kaj aliaj regionoj estas la lulilo de la ĉina civilizacio. Por helpi la ĉinojn tra la tuta mondo pli bone koni la historion de siaj prapatroj kaj diverslandajn popolojn pli bone koni Ĉinion kaj la ĉinan kulturon, ili reaperigis en la filmo la primitivan brilon de la ĉina civilizacio surbaze de



En historia ruino

serioza scienca sinteno kaj abundo da fidindaj arkeologiaj eltrovoj.

Por bone fari la filmon, laborantoj de la filma grupo faris plenajn kaj ĉiuf flankajn preparojn. Ili faris pli ol 1 000 diversajn antikvastilajn rekvizitojn, varbis ĉirkaŭ 1 000 amatorajn aktorojn, kinematografis ĉeloke en multaj historiaj ruinoj kaj invitis 6 arkeologojn fari ĉelokan klarigon. Iliaj piedsignoj troviĝis en 11 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj tra la tuta lando.

Por speguli la historion ĉe la baseno de la Flava Rivero, la filma grupo elektis la Ruinon Banpo de la antikva Kulturo Yangshao.

Antaŭ 6 700 jaroj, sur fekunda tero piede de Huashan-monto, okcidenta Ĉinio, la homoj vivis aŭtarcian vivon per fiŝado, ĉasado kaj terkulturado. Inter ili estis nek riĉuloj nek malriĉuloj, ĉiuj vivis egale. Granda koheremo strikte kunligis ĉiujn klananojn.

Ĝis hodiaŭ ĉinoj jam trovis pli ol 1 000 ruinojn de la Kulturo

Yangshao de antaŭ 5 000-7 000 jaroj. Tiuj ruinoj sin trovas ĉefe en la baseno de Weihe-rivero, en la okcidenta parto de Henan-provinco kaj en la suda parto de Shanxi-provinco. Tiu situo koincidas kun tiu de la hejmloko de Huangdi, prapatro de la ĉina nacio laŭ mito. Hodiaŭ oni ne plu dubas pri la deveno de la Kulturo Yangshao, ĉar ĝi estas centprocenta ĉina antikva kulturo. Dum sia pli-ol-2 000-jara daŭro, kun la baseno de la Flava Rivero kiel la centro, ĝi iom post iom etendiĝis ĉirkaŭen kaj fine formis la kernon de la primitiva kulturo de la ĉina nacio. Unuflanke ĝi senĉese ensorbis faktorojn de ĉirkaŭaj kulturoj kaj aliflanke malsamgrande influis ilin, kaj kune kun ili formis la bazon de la ĉina nacia kulturo.

S-ro Chen rakontis al ni, ke lia filma grupo kinematografis ankaŭ la ruinon de la Kulturo Dawenkou en Shandong-provinco, orienta Ĉinio. La ruino elmontras al ni la antikvan kulturon de ĉina oriento antaŭ 6 300 jaroj

kun la fama Taishan-monto kiel la centro. Dawenkou-anoj estis prauloj de dongyi-homoj. Tiu-tempe ili jam praktikis monogamion, ne ekzistis egaleco inter la homoj en la klana socio. En la tomboj de riĉuloj troviĝis multaj delikataj ceramikaĵoj kaj aliaj objektoj, dum en la tomboj de malriĉuloj estis nur kelkaj maldelikataj ceramikaĵoj. Inter la elterigitaj objektoj estis ceramikaĵo en formo de bombo. Fakuloj opinias, ke la signoj faritaj sur la ceramikaĵo estas primitivaj ideogramoj de la ĉina lingvo. Iu el la signoj signifas, ke la suno ĵus leviĝis en la oriento.

S-ro Chen diris al ni, ke en ĉiu loko, kien li kaj la kolegoj venis por filmi la gravajn ruinojn kaj historiajn restaĵojn, ili ĉiam sentis tiel fortan skuon en la fundo de la koro, ke li pretervole prenis la kameraon, avide kamerais por filmi ĉion, kion li vidis, kaj sen preterlaso komuniki al la spektantoj ĉion kune kun siaj propraj impresoj.

En la ruino de iu grandioza antikva urbo apud Dongting-lago en la meza baseno de Yangzi-rivero, ili sukcesis kinematografi riz-

kampon antaŭ 6 000 jaroj. Kanaletoj kondukas al la rizkampo. Tiu irigacia maniero estas preskaŭ sama al la hodiaŭa. Arkeologia esploro pruvis, ke rizplanto en tiu ĉi regiono havas historion de 9 000 jaroj.

Veturante orienten malsupren laŭ Yangzi-rivero, la filma grupo venis al alia grava ruino de la antaŭhistoria Kulturo Hemudu. Antaŭ 7 000 jaroj ankaŭ hemuduanoj scipovis kulturi rizon. Ili domoj estis faritaj el ligno kun mortezo kaj tenono, tute samaj kiel la nunaj. Ili ŝatis birdojn, adoris la sunon kaj kreis mirindajn artaĵojn. Sur iu ebura skulptaĵo estas la radianta suno,

kaj ambaŭflanke du birdoj rigardas unu la alian. Ĉu ili estas la unuaj feniksoj adorataj de la ĉina nacio?

Rakontante pri tio s-ro Chen montris al ni grandan kapornamaĵon kun alligitaj blankaj plumoj, pendantan sur ligna bretaro malantaŭ li, kaj diris, ke ĝi ne estas ĉapo de indiana tribestro, sed ĉapo portata de hemudu-a ŝamano en funebra ceremonio por reĝo antaŭ 5 000 jaroj.

Kiam mortis reĝo, oni metis lin sur delikatan silkon. La ŝamano metis ĉirkaŭ la kadavron diversajn jadaĵojn ornamentajn portitajn de la reĝo dum lia vivo, krome ŝutis sur ĝin multegon da jadpecoj. Ĉiuj tiuj jadaĵoj estis liaj riĉaĵoj disponeblaj post lia



La filma grupo

morto.

S-ro Chen rakontis al ni siajn impresojn pri la Ruino de la Kulturo Liangzhu en Yuhang de Zhejiang-provinco, orienta Ĉinio. En la jaro 1986, tie en iu tombo arkeologoj eltrovis pli ol 1 000 delikatajn jadaĵojn, kiuj malkovris al ni brilan jadan epokon de Liangzhu antaŭ 5 000 jaroj. Iuj jadaĵoj vere estas miniaturaj skulptaĵoj. Sur iu jadaĵo, en spaco de unu milimetro estis faritaj 5 maldikaj strekoj apenaŭ distingeblaj per nudaj okuloj. Ĝis nun arkeologoj ankoraŭ ne trovis instrumentojn, per kiuj liangzhuanoj prilaboris tiujn belajn kaj delikatajn jadaĵojn. Kiamaniere en

senmetala epoko ili sukcesis fari tiel fajnajn desegnojn kaj bildojn sur malmolaj jadaĵoj? Tio estas enigmo.

La juna reĝisoro rakontis ĉion kun neretenebla ekscitiĝo. Videble la riĉega ĉina antikva civilizacio forte impresis lin.

Li rakontis plu al ni, ke en la regiono de la okcidenta parto de Liaoning-provinco, nordorienta Ĉinio, la filma grupo kinematografis Ruinon de la Kulturo Hongshan antaŭ 5 000-6 000 jaroj. La eltrovo de la ŝtona tombaro en Niheliang fruigis la historion de la ĉina civilizacio je 1 000 jaroj.

En la ŝtonaj ĉerkoj de hongshan-anoj troviĝis nek ceramikaĵo nek aliaj objektoj, escepte de jadaĵoj. Mirinde estas, ke inter la elterigitaj jadaĵoj estas jada drako, skulptita simple tamen tre kurioze. Ĝi estas la plej frua jada drako. Ĝi kvazaŭ dirus al ni, pro kio la hodiaŭaj ĉinoj nomas sin posteuloj de drako.

Pere de ĉeloka kinematografado pri tiuj gravaj historiaj ruinoj kaj restaĵoj la filmo diras al ni, ke la ĉina civilizacio originis de la vasta tero de Ĉinio. La yangshao-anoj, banpo-anoj, hemudu-anoj, liangzhu-anoj, dawenkou-anoj,

hongshan-anoj kaj aliaj, kiuj siatempe aktivadis sur la vasta tero de Ĉinio, senescepte estis prauloj de la ĉina nacio. La de ili kreitaj brilaj antikvaj kulturoj senescepte estas la fonto de la ĉina civilizacio. En la longa impeta progresado de la historio okazis inter ili kontaktoj, interfluoj, konfliktoj kaj eĉ militoj, sed ili fine kuniĝis kaj formis la grandan ĉinan nacion kaj metis la unuajn angulŝtonojn de la granda ĉina civilizacio.

S-ro Chen diris al ni, ke la tuta filmo "La Ĉina Civilizacio" konsistas el 12 partoj kaj plenumiĝos en 3-5 jaroj. ■

# Ĉu konfuceanismo furoros en la 21-a jarcento?

75 Nobel-premiitoj en sia komuna deklaro alvokis, ke "se la homaro deziras ekzisti, ĝi nepre devas lerni la saĝon de Konfuceo, kiu vivis antaŭ 2 000 jaroj!"

de ZHANG QICHENG

**A**LVENIS la jaro 2000. En la tuta mondo oni bonvenigis la novan jarcenton, la novan jarmilon, per pompaj kaj grandiozaj ceremonioj kun la bondeziroj, ke la mondo fariĝu pli paca, progresa kaj prospera. Tiuj bondeziroj jam ripetigis centfoje en la pasinteco, tamen ili neniam efektiviĝis. Ĉu ili efektiviĝos en la nova jarcento? Tion oni esperas, sed dubas, ĉar bonvenigante la novan epokon, la homaro alfrontas multajn malfacile solveblajn problemojn: lokaj militoj neniam ĉesas; la diferencoj inter evoluantaj (riĉaj) landoj kaj evoluantaj (malriĉaj) landoj pligrandiĝas; ekologiaj kondiĉoj severe malboniĝas; precipe la krizo de la dekadenco de virto okulfrape akriĝas... Oni povas diri, ke la homaron trafis tre danĝera morala malsano.

Por "resanigi" la homaron, oni devas havi konvenajn kaj efikajn rimedojn. Tiucele, la malproksimvidaj prudentuloj, inkl. multajn Nobel-premiitojn, el divesaj partoj de la terĝlobo klopodis kaj finfine trovis, ke la instruoj de Konfuceo povos esti la efikaj rimedoj. En la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento, tiuj entuziasmaj personoj starigis la mondiskalan organizon "Internacia Federacio de Konfuceanismo". Tiu organizo kune kun Unesko



La aŭtoro

okazigis lastoktobre en Pekino grandiozan kunvenon por jubilei la 2550-an datrevenon de la naskiĝo de Konfuceo. La kunveno kun pli ol 400 ĉeestantoj, inkl. politikajn gravulojn, erudiciulojn, profesorojn kaj studentojn de konfuceanismo el Azio, Aŭstralio, Eŭropo, Usono k.c., funkciis samtempe kiel internacia simpozio por diskuti la temon "Konfuceanismo kaj la paco kaj evoluo en la 21-a jarcento". Ĉio tio montras, ke tiuj prudentuloj konsideras, ke la kvintesenco de konfuceanismo ankoraŭ valoras por la nuntempa homaro.

Konfuceanismo estas teorio de Konfuceo ĉefe pri etiko kaj

virto, kaj ĝia kerno estas humaneco. Pri la demando "kio estas humaneco", la Majstro respondis: "Ĝi estas amo al ĉiuj homoj." Kaj el tiu kerna ideo li instruis: "Ne faru al aliaj tion, kion vi ne deziras fari al vi mem." Tiu instruo estas konsiderata de la prudentuloj kiel minimuma kriterio de homa virto kaj ĝenerale akceptebla, ĉar ĝi estas relative facile praktikebla. Iuj el ili eĉ opinias, ke ĝi povas fariĝi la "ora regulo" de etiko ĝenerale aplikata en la tuta mondo. Estas vere, ke se ĉiuj homoj praktikus ĝin en sia konduto, malpliigus almenaŭ la fiagoj utilaj al memprofito sed malutilaj al aliaj kaj pli maloftiĝus la krimoj rezultantaj de tiuj agadoj, sekve la tuta homa socio fariĝus pli sekura kaj stabila.

Aliaj prudentuloj opinias, ke estas utile praktiki tiun doktrinon de Konfuceo, sed tio ankoraŭ ne sufiĉas, ĉar ĝi estas negativa en senco. Oni devas apliki alian pli pozitivan doktrinon akcentitan de Konfuceo, t.e. "Vi mem deziras firme stari inter la homoj, tiam helpu aliajn firme stariĝi; vi mem deziras sukceson, tiam helpu aliajn atingi la samon." Certe, tiu doktrino estas pli alta kriterio de homa virto, ne universale praktikebla por ĉiuj. Sed se

ni instruas ĝin al homoj, eble ni povas plialtigi ilian virton kaj fari ilin bonkoraj kaj zorgemaj al aliaj.

Konfuceo emfazas, ke kio plej valoras en la homaj rilatoj, estas harmonio. Kaj el tio li pledis por la principo "kunekzisti en harmonio malgraŭ malsameco". Jam en la antikva epoko la ĉinaj pensuloj bone konis la signifon de "malsameco". Ili konsciis, ke ĉiuj estaĵoj kaj en la naturo kaj en la homa socio ja estas malsamaj kaj diversaj. Sen malsameco kaj diverseco ne estus malsamaj animaloj, vegetaloj kaj aliaj estaĵoj. Ili elokvente argumentis: sen diversaj spicaĵoj ne estus bongustaj manĝaĵoj; kaj sen harmonia aranĝo de diversaj sonoj ne estus muziko. Al tiuj argumentoj oni povas aldoni, ke sen diversaj koloroj ne estus ĝardeno kun diverskoloraj belaj floroj. Do, ni povas diri, ke malsameco kaj diverseco ja estas esenca karakterizaĵo de la naturo kaj la homa socio. Tiu principo de konfuceanismo aparte gravas por la homa socio, ĉar en ĝi troviĝas multaj aferoj, kiuj estas malsamaj kaj diversaj. Se ne estus harmonia kunekzistado inter ili, sendube okazus severaj konfliktoj, eĉ sangaj bataloj. En la pasinteco kaj nuntempo, en la mondo ofte okazis kaj okazas konfliktoj inter malsamaj rasoj, malsamaj religioj kaj eĉ malsamaj lingvoj. Tiuj konfliktoj estas eviteblaj, se oni traktas ilin laŭ tiu konfuceanisma principo.

Konfuceo asertis: "La komandanto povas esti kaptita for de sia armeo, sed la volo de eĉ ordinara homo ne povas esti forprenita de li." Tio signifas, ke ankaŭ la ordinara homo havas sian nehumilgeblan karakteron, kaj oni

devas respekti lian volon anstataŭ trudi al li tion, kion li ne volas. Tiusence, en la homa socio oni devas respekti unu alian; kaj en la internaciaj aferoj ĉiuj nacioj devas respekti sin reciproke, kaj la fortaj nacioj devas respekti la sendependecon kaj suverenecon de la malpli fortaj. Iu ĉina profesoro skribis en sia verko, ke ĝuste surbaze de la supre menciitaj principoj de la doktrino de Konfuceo, Ĉinio kune kun Hindio kaj Birmo iniciatis la kvin principojn de paca kunekzistado\* kiel gravajn principojn en la internaciaj rilatoj de diversaj nacioj kun malsamaj sociaj sistemoj.

La malproksimvidaj erudiciuloj kaj politikistoj, kiuj atente observas la mondan situacion, emfazas, ke estas urĝa bezono praktiki la supran doktrinon de Konfuceo en la nunaj internaciaj rilatoj. Ili argumentas: se ĉiuj nacioj praktikus tiun doktrinon en siaj agadoj en la internaciaj aferoj, povus pliboniĝi la nuna tumulto, en kiu la fortaj nacioj ofendas la malfortajn; la riĉaj landoj ekspluatas la malriĉajn; hegemoniismo arbitras kaj politiko de potenco furiozas ktp. Kaj la problemoj de ekologia krizo, kiu minacas la tutan homaron, eble estus pli bone traktata dank' al la harmonia kunlaborado inter la koncernaj landoj. Unuvorte, sub la inspiro de konfuceanismo, la mondo fariĝos pli paca kaj pli prospera, la interkompreniĝo kaj amikeco inter diversaj popoloj estos pli profundaj kaj intimaj, kaj la popolamasoj vivos feliĉe kaj trankvile.

Laŭ konfuceanismo, eĉ ordinara homo, devas esti respondeca por la bono de la

homa socio kaj plie por la bono de la tuta homaro. Do, ĉu la devoportaj politikistoj de diversaj landoj ne devas kun granda entuziasmo praktiki la doktrinon de Konfuceo por realigi la mondpacon kaj ekonomian evoluon de ĉiuj nacioj?

En la pasinta jarcento la homaro grandpaŝe progresis en sciencoj kaj tekniko, kaj ankaŭ en ekonomio, sed bedaŭrinde, ĝi morale ne progresis, eĉ regresis. Tial la malproksimvidaj prudentuloj plenforte pledis, ke ju pli progresas la sciencoj kaj tekniko, kaj ju pli pliboniĝas la materialaj vivkondiĉoj, des pli necesas grandskale diskonigi konfuceanisman por altigi la virtokonscion de la homoj. Laŭ raporto, en la jaro 1988, en Parizo, 75 Nobel-premiitoj en sia komuna deklaro alvokis, ke "se la homaro deziras ekzisti, ĝi nepre devas lerni la saĝon de Konfuceo, kiu vivis antaŭ 2 000 jaroj!"


Mi do levas la demandon: "Ĉu konfuceanismo furoros en la 21-a jarcento?" Kompreneble, mi ne nur demandas, sed sincere esperas, ke ĝi ne restos nur demando, sed efektiviĝos en la venonta reala mondo. Kaj mi kredas, ke tio ne estas nur mia persona ideo, sed reprezentas ankaŭ la vidpunkton de la esperantista komunumo tutmonda, ĉar iasence la esperantistaro ja estas fervora kolegaro de konfuceanoj. ■

---

\* Tio estas: 1. reciproka respekto de suvereneco kaj teritoria integreco; 2. reciproka neagreso; 3. reciproka neinterveno unu en alies internajn aferojn; 4. egaleco kaj reciproka utilo; kaj 5. paca kunekzistado.

# Serĉi antikvajn morojn de Va-nacio

Mi renkontis scivolemajn infanojn kun rondaj gagatnigraj okuloj kaj estis ravita de la vidaĵo: pajlaj kabanoj inter baŝoaroj, bambuaj ŝedoj, bovaj kranioj, virinoj ŝpinantaj, knaboj pistantaj... Ĉio odoris lirikecon tute fremdan al la moderna civilizacio



Montvilaĝo de va-oj

---

de LIU DONGPING

---

**T**RANSIRINTE Lancang-riveron inter montoj, la aŭto veturis okcidenten, kaj la montoj fariĝis pli kaj pli grandaj.

Tie estas Awa-monto en sudokcidento de Ĉinio. La monto famas ne pro apikeco, sed pro grandeco kaj kontinueco. Kaj krome, tie la membroj de Va-nacio havas la karakteron de la monto.

## LEGENDO DE "SIGANG-LI"

De malproksime mi jam vidis la urbon de la Va-nacia Aŭtonoma Gubernio Ximeng. La urbo, negranda, sidas sur la supro de la monto. Sed pro la alta situo ĝi aspektas majeste. En la posttagmeza sunbrilo la diversa-stilaj konstruaĵoj en la verda montaro radias vigecon.

Mia aŭto veturis en la urbon. En la mezo de la ĉefa strato de la urbo staras granita skulptaĵo kun gravuritaj vortoj "Posteuloj de Sigang-Li". En la va-a lingvo "Sigang" signifas "ŝtonan kavernon", kaj "Li" — "elveni". Kaj "Sigang-Li" signifas do "homon elvenintan el ŝtona kaverno". Mito rakontas, ke antaŭlonge la prapatroj de Va-nacio loĝis en ŝtonaj kavernoj en grandaj montoj. Iun tagon dio alsendis





**Bova kapo por kulto**

kelke da birdetoj, kaj ili pikadis sur la kaverno kaj faris truon. Unu el la kavernoj eliris tra la truo kaj de tiam naskiĝis Va-nacio. La nacioj forlasis la kavernojn kaj konstruis vilaĝojn proksime de "Sigang" kaj la nacio daŭris generacio post generacio.

Krom Yunnan-provinco, ankaŭ Birmo kaj Laoso havas Va-nacion, kaj la Va-nacioj de tiuj landoj samopinias, ke "Sigang-Li" estas ilia origina loko kaj sanktejo kiel Mekko por la islamanoj. Ĉiujare multaj homoj grupe venas tien por kulti la prapatrojn sur montoj proksime de Bagedai nord-okcidente de la gubernia urbo, kiun ili prenis kiel naskiĝlokon de Va-nacio.

## ANTIKA KULTADO

Por serĉi la originan lokon de Va-nacio, mi veturis al la vilaĝo Bagedai. La aŭto tangadis du horojn sur la vojo kaj mi sentis, ke la loko estas forgesita de la epoko en frapanta kontrasto pro la rapide disvolviĝanta moderna ekonomio. La longa historio koaguliĝis tie kaj formis "muzeon" pri la primitiva vivmaniero de Va-nacio, tre interesan por la nunaj homoj.

Mi renkontis scivolemajn infanojn kun rondaj gagatnigraj okuloj kaj estis ravita de la vidaĵo: pajlaj kabanaj interbaŝaroj, bambuaj ŝedoj, bovaj kranioj, virinoj ŝpinantaj, knaboj pistantaj... Ĉio odoris lirikecon tute fremdan al la moderna civilizacio. Fine mia rigardo falis sur nigran foston antaŭ iu pajla kabano. La fosto altis iom pli ol unu metron. Tie staris pluraj en formo de Y. Ĉu ili ne estas bovobuĉaj fostoj? Mi pensis, ke nur sur scenejo oni povas vidi prezentadon de bovobuĉa danco. Sed nun, ekster mia atendo, en va-a vilaĝo profunde de granda monto mi vidis la primitivan moron de bovobuĉado per lanco.

Va-nacio estas sentima. La bovobuĉado per lanco estas unu el la moroj de primitivaj triboj, kiuj povas konturi la karakterojn de la nacio. La bovo estis ligita al la fosto, kaj la buĉisto devis enpiki la akran lancon rekte inter la maldekstrajn ripojn. Bona buĉisto povis mortigi bovon per unu enpiko. Bovobuĉado estis farita ofte por kultado. Bovo estis grava riĉaĵo de primitivaj triboj de Va-nacio, kaj bovobuĉado esprimis piecon kaj respekton al dio.

Pli barbara ol bovobuĉado estis kulto de la primitivaj triboj de la nacio per hom-ofero. Laŭdire tio estis la plej alta ofero de la primitivaj triboj. Tio originis de milito inter triboj. Post milito oni dehakis la kapon de la kaptitoj en signo de trofeo. Poste tiu kutimo fariĝis kulta maniero kaj oni oferis la homan kapon al la ligna tamburo por peti pacon kaj al la greno por peti riĉan rikolton. Ligna tamburo estas adoraĵo de Va-nacio kaj rigardata kiel aĵo interkomunikanta la teron kaj la ĉielon, kaj estas ankaŭ objekto aperinta en la vivo en la primitiva montaro. Tamburo estis frapata por alvoki la tribanojn, informi najbaran amikan tribon por helpo pro kriza okazo kaj stimuli la batalantojn

al ekspedicio.

Antaŭ la vilaĝo estas densa primitiva arbaro, kaj mi vidis tie en herbaroj starigitajn homoferajn fostojn, kiuj sentigis solecon pro la forlasiteco. Vere, bovobuĉado kaj hom-oferado jam fariĝis historio kaj estis enfermitaj en la "muzeon", kaj la nunaj va-oj estas bonkoraj kaj pacamaj.

## AMARA TEO DE VANACIO

Ĝis la fino mi ne sukcesis eniri en la miton de Va-nacio, vizitante Bagedai. Mi vidis nur verdan montĉenon en la malproksimo. Vojgvidanto diris, ke tie estas "Sigang-Li". Ne klare vidiĝis elstara roko kaj sube ŝajne estas kaverno. Tio ja estas sufiĉa por mia imago pri la vivo de la nacio. Kaj du karakterizaj kutimoj de la nacio en la aktuala vivo profunde impresis min. Ili estas teo kaj vino.

La nacio nomas vinon faritan el rizo "Bulai". La vino, refreŝiga, neforta kaj sensoifiga, estas ŝatata de ĉiuj va-oj. Kiam venas gasto, la va-oj prezentas al li bambuan tason plenan de vino por esprimi bonvenigon kaj respekton; kaj en festotagoj vino estas nemalhavebla. La plej aĝa vilaĝano trinkas vinon la unua kaj tostas al la publiko, poste la tuta vilaĝo dronas en gaja interparolado, dancado kaj kantado. La amara teo estas nomata ankaŭ "kuirata teo". Oni longe boligas teon kaj la gusto fariĝas tre amara. La nacioj trinkas teon de ili mem kulturatan. Ili boligas sur fajro teon en malmulta akvo en fajenca poto kaj longe kuiras ĝis la tefolioj fariĝas kiel ŝlimo. Tiam la akvo en la poto jam estas tre malmulta. La gusto estas tre amara kaj iom adstringa, sed refreŝiga, tial la nacioj tre ŝatas trinki tian teon post laciga laboro en varmega tago. ■

# Ĉu vere plezuriga lernado?

Li memoris, ke kiam la filino vizitis elementlernejon en Ĉinio, li ofte sentis doloron, vidante la etulinon sufokata de peza lernado

de XIANG HONG

**E**N la 6-a numero, 1998, nia revuo aperigis la artikolon "Malpezigi ŝarĝon de la lernantoj", kiu temas pri la eduka reformado en ĉinaj element- kaj mezlernejoj, komencita en la jaro 1997. Hodiaŭ mi pritraktas la saman temon pro nekontentiga plenumado de tiu reformado, pli pro la sinsekvaj politikoj faritaj de la eduka departemento komence de tiu ĉi jaro, celantaj efektive malpezigi ŝarĝon de la lernantoj. Dank' al tiuj politikoj, la ĉinaj unua- kaj duklasaj elementlernejoj pasigis siajn versencajn vintrajn feriojn sen hejmtasko. Kaj tuj en la nova semestro, pro malmultiĝo de lernolibroj kaj referencaj libroj, malpezigi la lernosako kaj pli multiĝis libertempo de la infanoj. Tamen vizaĝe al la ĝojo de la infanoj, nemalmultaj gepatroj kaj instruistoj male dronis en maltrankvilo: "Ĉu tio estas konvena? Kiun kulpigi, se estontece la infanoj malsukcesos en la enira ekzameno por altlernejoj?"

Kaj nature, la tuta socio komencis pripensi kaj diskuti la tradician edukan sistemon kaj ĝian ĝisfundan reformadon.

## KIAM LERNADO FARIĜAS NEPLEZURIGA...

En la pasintaj jaroj, inter la ĉinaj lernantoj studentaj en aliaj landoj

rimarkinde multiĝis element- kaj mezlernejoj. Oni preferas multkoste sendi sian infanon studi en malproksima lando ol devigi la lastan akcepti edukadon en la patrolando. Kial? Unu kialo rilatas al komfortaj vivkondiĉoj eksterlande kaj la alia, ankaŭ la ĉefa, estas, ke studo en Ĉinio certe estas laciga. Vere, la ĉinaj element- kaj mezlernejoj estas la plej lacaj en la mondo. Antaŭ nelonge, iu fama ĉina televida anoncisto menciis sian filinon, kiu nun lernas en alilanda mezlernejo. Li memoris, ke kiam la filino vizitis elementlernejon en Ĉinio, li ofte sentis doloron, vidante la etulinon sufokata de peza lernado. Ĉiufoje, kiam li helpis ŝin demeti la librosakon, li surpriziĝis pri ĝia granda pezeco. Finfine li decidis sendi ŝin lerni alilande.

Dum mia mezlerneja vivo en la 80-aj jaroj, cirkulis inter ni multaj kanzonoj aludantaj la lacigan lernejan vivon. Nun mi ankoraŭ klare memoras unu el ili, konsistantan el filmotitoloj kaj priskribantan nian senton por ĉiu venonta tago:



En la Ĉina Scienca-Teknologia Muzeo

*Lundo — Senfina Vojo;  
Mardo — Rido de Ĉagrenito;  
Merkredo — Eniri Abismon;  
Ĵaŭdo — Mallumo antaŭ  
Tagiĝo;  
Vendredo — Triumfa Eskapo.*

Ŝajnas al mi, ke por la nuntempaj lernantoj eĉ ne eblas la "triumfa eskapo", ĉar la pli kaj pli intensiĝanta ekzamena konkuro devigas ilin, krom fari hejmtaskon en postlecionaj horoj, ankaŭ viziti diversajn kursojn de muziko, danco, pentrado ktp., malgraŭ ke ili ŝatas tion aŭ ne. Ĉu muziko, ĉu pentrado, ĉu sporto, ĉio tio mem estas plezuriga. Tamen nun por multaj ĉinaj lernantoj — almenaŭ por iliaj gepatroj — ellerni tiujn kapablojn signifas havigi ekstrajn poentojn en la enira ekzameno por altlernejoj. Kiam celo superas intereson, lernado nature perdas sian signifon, tiel lernado ne plu estas plezuriga.

En la pasintaj 20 jaroj la sistemo de enira ekzameno por altlernejoj ja multe kontribuis al la reformanta Ĉinio en elekto de kapabluloj. Sed iom post iom la sistemo fariĝis "direkta bastono", kiu gvidas la edukadon mezlernejan, elementlernejan kaj eĉ infanĝardenan. Ĉinoj kutime konsideras iun kapabla laŭ ties altaj ekzamenaj poentoj kaj atesto de licencio. Por lernantoj la enira ekzameno por altlernejoj estas nepra pasejo. Precipe por la mezlernejaj diplomigintoj ŝajne ĉiam mankas tempo por dormado kaj estas senfina la lernotasko.

Kredeble la ekzamena travivaĵo estas malfacile forgesebla por multaj ekzamenitoj. Post mia eklaboro plurfoje mi sonĝis, ke mi sidas en la ekzamenejo kaj surprizite vekigis.

Enketo farita de iu aŭtoritata departemento montras, ke en la tuta lando nur 8.4% da elementlernejoj, 10.7% da lernantoj de malsuperaj mezlernejoj kaj 4.3% da lernantoj de superaj mezlernejoj vizitas lernejon pro "ŝato de lernado". Kiam la lernado fariĝas pli kaj pli neplezuriga, oni pravas demandi: Ĉu jam devias de sia difinita celo la tradicia eduka metodo, kiu daŭris dekojn da jaroj?

## KIA KAPABLULO BEZONATA?

Iasence edukado estas duklinga glavo, kiu "povas kreskigi kaj ankaŭ sufoki la kreativecon de lernantoj" — vortoj en iu dokumento de Unesko.

Iu germana eduka fakulo, post esploro en Ĉinio, diris al la ĉinoj, kiuj akompanis lin: "Viaj lernantoj legas pli multe kaj dediĉas pli da tempo al lernado ol la niaj, sed multaj de vi aĉetitaj produktaĵoj estas faritaj de ni."

Profesoro Zhu Jingwu, kiu instruas en la Universitato de Houston de Usono, diris, ke en lia laboratorio 60% da studentoj venis el la ĉeftero de Ĉinio, ili ĝenerale akiris altajn ekzamenajn poentojn, tamen evidente mankas al ili eksperimenta povo.

En Ĉinio la tradicia edukado prenas lecionon kaj lernolibron kiel la ĉefajn, kaj la lerna metodo estas mekanike parkerigi. La lernantoj tiel penadas por trakti la multnombrajn lernobjektojn, ke ili ne havas energion kaj spacon por kreskigi siajn proprajn interesojn kaj kreativecon. La tro peza ŝarĝo ne nur damaĝas la sanon de la lernantoj, sed ankaŭ sufokas ilian deziron pri scioj, malaltigas la lernan rezulton kaj kaŭzas al ili diversajn



Infanoj ĉe fontano

psikajn kaj agmanierajn problemojn. La nunaj lernantoj ĝenerale havas tiajn mankojn en karaktero, kiaj psika malforteco, egoismo kaj dependeco. Fakte, sana karaktero sen scio estas malforta; kaj sufiĉaj scioj sen bona karaktero estas danĝeraj por la socio. Ĉu la lernantoj povus preni sur sin la estontecon de la patrolando, se ili estus kapablaj tamen ne honestaj, scioriĉaj tamen

egoismaj, fortaj en kreo tamen nedevokonsciaj...?

Kiam la tradicia eduka sistemo produktas multajn "por-ekzamenajn maŝinojn" anstataŭ versencajn kapablulojn, estas neevitebla la ĝisfunda reformado. Mi kredas, ke fine venos la tago, kiam la sistemo de enira ekzameno por altlernejoj estos abolita, kvankam tiu tago estas ankoraŭ malproksima. ■

### ABONKOTIZO DE EL POPOLA ĈINIO POR 2000

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Pagenda sumo
Aŭstralio	AUD	19	24	43
Brazilo	USD	12	6	18
Bulgario	USD	10	6	16
Britio	GBP	10	12	22
Eŭro-landoj	EUR	12.80	16	28.80
Francio	FRF	84	108	192
Germanio	DEM	24	32	56
Italio	ITL	24000	30800	54800
Japanio	JPY	1700	2160	3860
Nederlando	NLG	28	35	63
Usono	USD	14	18	32
Vjetnamio	USD	10	6	16

1. Ĉiuj evoluintaj landoj ne menciitaj supre pagu kiel Usono aŭ Nederlando.

2. Meksikio, Singapuro kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko pagu kiel Brazilo; ankaŭ Hongkong pagu kiel Brazilo.

3. Ĉiuj landoj en Azio, Afriko, Orienta Eŭropo kaj la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj ne menciitaj supre pagu kiel Bulgario.

4. La 11 EU-landoj kun eŭro kiel komuna mono povas pagi ankaŭ kiel Eŭro-landoj.

Por aera sendo bonvolu nepre aldoni 18 USD aŭ valoron egalan al la pagenda sumo.

# Fragmentoj el mia vizito en Japanio (II)


Dank' al Esperanto mi kaj gesinjoroj Osioka havis tre viglan kaj sinceran interkomunikadon kaj akiris pli kaj pli profundan interkomprenon. Ni sentas pezan taskon sur la ŝultro

de WANG SHIRONG


## FAMILIARA INTERŜANĜO

Hirosimo estas vaste konata de la mondo pro la eksplodo de atombombo antaŭ 55 jaroj. La 23-an de oktobro 1999, kiam mi venis de Osaka al Hirosimo per superekspreso, entuziasma sinjoro Osioka Moritaka kaj lia edzino s-ino Taeko jam estis atendantaj min sur la kajo.

En akompano de s-ino Taeko mi vizitis la Pacmemorigan Muzeon, la simblan konstruaĵon de Hirosimo. Sur la placo antaŭ la muzeo tapiŝiĝis gazonoj, susuris fontanoj, kaj la akveroj brilante rebrilis en la sunlumo. Ambaŭflanke de avenuoj infanoj sin amuzis per sidoglitado, baskulo kaj trapezo, gajaj geknabegoj sidis antaŭ florbedo kaj kantis en akompano de gitaro... Mi vidis viglan, prosperan kaj pacan panoramon, kaj mi apenaŭ povis identigi ĝin kun la ruino en mia impresio: Ĉu tie antaŭe eksplodis



Gajaj geknabegoj en Hirosimo



Familiara renkontiĝo en la hejmo de s-ro Osioka Morita

atombombo?

En la muzeo regis iom sufoka soleneco. Tie mi vidis fotojn pri la aspektoj de la urbo antaŭ kaj post la eksplodo de atombombo kaj pri la teruregaj scenoj de la viktimoj. En la halo staras globuso, sur kiu estas markitaj la landoj, kiuj posedas nukleajn armilojn en malsamaj kvantoj.

Vizitante la ekspozicion, mi kaj s-ino Taeko faris tre sinceran interŝanĝon de la opinioj pri milito kaj paco.

S-ro Osioka Moritaka estas tre afabla kaj senkaŝa samideano. Dum la Dua Mondmilito lia patro servis en la japana agresa armeo en la nordoriento de Ĉinio. S-ro Osioka senkaŝe diris al mi, ke li ĉiam sentas necesecon de pardonpeto al la ĉina popolo. S-ino Taeko estas instruistino en elementa lernejo. Ŝi vizitis la

fosaĵon kaj monton de skeletoj de la ĉinaj viktimoj pro la japana agreso en la nordoriento de Ĉinio kaj estis skuita en la animo. Ges-roj Osioka estas pacamaj kaj justamaj, sed ili ne komprenas, kial Ĉinio bezonas nukleajn armilojn.

Mi bone scias, kian katastrofon la atombomboj alportis al la japana popolo kaj kiel la popolo dolore suferadis de la koŝmaro. Mi tre simpatias kun la japana popolo kaj kredas, ke la popoloj de Ĉinio kaj Japanio malamegas agreson kaj militon kaj defendas la mondpacon. Ni esperantistoj ja estas pacamaj kaj devas penadi por malhelpi militon. Sed kiam iu superpotenca lando en la mondo ĉiam minacas la aliajn landojn svingante la nukleajn armilojn en la manoj, la pacamaj sed minacataj landoj,

kiuj bezonas sin defendi, devas havi ian efikan rimedon por sin defendi kaj rompi la nuklean ĉantaĝon kaj hegemonion. Kaj fakte, en komparo kun aliaj nukleaj landoj, Ĉinio havas tre malmultajn nukleajn armilojn. Ĝi estas malriĉa, kaj ĝia popolo preferas uzi la monon por la konstruado de la lando kaj plibonigi sian vivon ol fabriki armilojn. Mi volus fari ekzemplon: se mia najbaro havas pafilon kun malamika intenco, mi devas havi almenaŭ bastonegon por eventuala defendo. La japana popolo, kiu terure suferis de la atombomboj, malamegas tian armilon kaj neniam volas ripetigon de la sukuba historio. Ankaŭ la ĉina popolo malamas militon kaj promesas neniam uzi la unua nuklean armilon kaj senlace penas ĝis la kompleta malpermeso de la nukleaj armiloj.

Dank' al Esperanto mi kaj gesinjoroj Osioka havis tre viglan kaj sinceran interkomunikadon kaj akiris pli kaj pli profundan interkomprenon. Ni sentas pezan taskon sur la ŝultro. Adiaŭante Hirosimon, mi staris minutojn antaŭ la domo de s-ro Osioka sur la Ora Monto kaj faris longan ĉirkaŭrigardon al la bela reviviĝinta Hirosimo malsupre de la monto sendante koran saluton kaj pie preĝis, ke la terurega koŝmaro de la homaro estu la lasta, ke la mondpaco estu eterna, kaj ke ĉiuj esperantistoj kaj ĉiuj aliaj homoj de la mondo estu amikaj kaj penu unuanime por krei mondon sen milito!

## AKTIVULOJ EN LA JAPANA E-MOVADO

E-movado en Japanio progresas ne impete, sed solidpaŝe kaj stabile, kaj mi atribuis tion al nombro da aktivuloj en la movado.

Unu el ili estas s-ro Takeuti Yosikazu. Li estas konata de multaj ĉinaj esperantistoj pro sia

sindonema laborado por E-movado en Japanio kaj Azio. Li estis elektita kiel prezidanto de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM). Li vizitis Ĉinion almenaŭ 13 fojojn kaj estas malnova amiko de la Ĉina Esperanto-Ligo, El Popola Ĉinio kaj la Esperanta Sekcio de la Ĉina Radio Internacia. Ne estas mia komplimento, ke laŭ lia granda fervoro por Esperanto li ŝajne estas multe pli juna ol li efektive estas. Kaj li diris, ke ĝuste Esperanto reunigis lin kaj li volantas pagi por E-movado, se li tion faris. Pro lia energia aktivado en lia urbo Takatuki kaj la Kansaja Regiono kaj ankaŭ



JEI aljuĝis al s-ro Takeuti Yosikazu Ossaka-premion en 1999.

pro lia granda kontribuo al la E-movado en Azio, la Japana Esperanto-Instituto aljuĝis al li Ossaka-premion de 1999. Ossaka-premio estas aljuĝata al persono aŭ grupo kun granda kontribuo al E-movado, memore al s-ro Ossaka Kenĵi, la fondinto de la Japana Esperanto-Instituto kaj la patro de E-movado en Japanio. Sendube s-ro Takeuti meritas la premion, kvankam li atribuis sian sukceson al la subteno kaj kunlaboro de la samideanoj. Li

modeste diris, ke li nur pene kaj serioze laboradis same kiel multaj aliaj samideanoj, kaj interpretis la aljuĝon kiel honoradon ankaŭ al liaj kolegoj en la aliaj aziaj landoj.

Alia aktivulo estas s-ino Syozi Keiko. Ŝi funkciigas eldonejon kaj eldonis jam multajn lernolibrojn, legolibrojn kaj dokumentarojn pri Esperanto. Unu tagon antaŭ mia forlaso de Japanio mi vizitis ŝin en ŝia hejmo. Tiutage tri kursoj iris en ŝia hejmo. La progresigan kurson gvidis eminentulo s-ro Yamasaki. Li vigle gvidis la kurson kaj lia leciondonado pri intersaluto ĉe renkontiĝo estis tre instrua por mi. Ankaŭ s-ino Syozi gvidis unu el la kursoj. La kursanoj estas tre dankaj al ŝi, ke ŝi estas afabla cedi siajn vastajn salonojn al la kursoj. Ankaŭ ŝia edzo kaj la filo estas fidelaj al Esperanto kaj dediĉis multan tempon al E-movado malgraŭ intensa profesia laboro.

S-ro Isino Yosio, sekretario de JEI, estas tre okupita de ĉiutaga laboro en la oficejo de JEI. La unuajn 2 noktojn post mia atingo al Tokio mi pasloĝis en lia hejmo kaj vidis, ke li laboris ĝis tre malfruaj horoj por preparado de la kongreso. Post la kongreso li ankoraŭ estis superŝutita de diversaj aferoj pro la instituto kaj lia edzino s-ino Masao kun granda volonteco helpis lin en la laboro por E-movado.

La paĝoj disponeblaj por mi ne permesas al mi detale rakonti pri ĉiuj fervoraj samideanoj, ekzemple menciindaj estas s-roj Nagase Yosikatu, Fukuda Toshihiro, Ikai Yosikazu kaj multaj aliaj, kiuj fervore aktivadas por nia lingvo kaj la movado. Dank' al ilia senlaca penado kaj kontribuo la japana E-movado fariĝis tre grava parto de la azia kaj tutmonda E-movado. Mi deziras al ili pli grandajn sukcesojn en la Esperanta afero kaj ĉion bonan al ilia familio. ■

## BUDHO-KULTADO EN LHASA

En Tibeto ĉiuj estas religianoj, tial pilgrimado al sanktaj montoj, lagoj kaj temploj por benopeti, pentofari kaj esprimi sian dankon al Budho portas religiajn trajtojn. En Lhasa, urbo abunda je temploj, ofte okazas ceremonio de kulto al Budho, ĝenerale inter novembro



Pilgrimantoj antaŭ Dazhao-templo

kaj la sekvanta printempo. Tiam en ĉiuj temploj de Lhasa kolektiĝas sennombraj piaj religianoj, kiuj kun butera lampo en la mano, turnante preĝradon, bonorde iras al la templa halo por tie bruligi incenson kaj adorkliniĝi antaŭ la budha statuo.

En Dazhao-templo, konstruita antaŭ 1 300 jaroj, estas ora statuo de la 12-jara Ŝakjamunio. La statuo estis kunportita de princino Wencheng (?-680) de la Tang-dinastia ĉefurbo Chang'an en Tibeton. Ĉiuj pilgrimantoj al Lhasa devas fari kulton tie. Tiam la strato Baguo proksima al la templo estas aparte spektakla.

En Bala-templo, por kultado al la budha statuo, lamaoj recitas sutrojn en la halo ekde la 6-a matene. La enhavo de la recitado estas decidita de la kultantoj, kiuj donacas al la lamaoj manĝaĵojn kaj monon.

Multaj pilgrimantoj venas de

aliaj partoj de Ĉinio. Nun ŝoseoj kunligas Lhasa kun aliaj lokoj de la lando, kaj ne plu estas pilgrimantoj, kiuj longe iris piede aŭ rajdante al la budhisma sanktejo.

## FERAJ BOVOJ ĈE LA FLAVA RIVERO

Ĉe la orienta bordo de la Flava Rivero en la urbo Yongji, Ŝanxi-provinco, elteriĝis kvar feraj bovoj faritaj en Tang-dinastio (618-907). La bovoj longas 3-3.3 m. kaj altas 1.50-1.66 m. Fakuloj pri metalurgia historio konjektis, ke siatempe por muldi la bovojn

oni fandis 292 tunojn da fero kaj apud ĉiu bovo estis fera homo, t.e. paŝtisto. Laŭ la formo, vestoj, kaj situo kaj laŭ la amikaj interrilatoj inter Tang-imperio kaj aliaj nacioj la kvar feraj homoj reprezentas ujuguron, mongolon, tibetanon kaj hanon.

Inter la kvar feraj bovoj staris du feraj montoj. Meze de la bovoj, homoj kaj montoj estas fera akso. 20 m. malantaŭ ĝi estas 7 altaj feraj kolonoj, kiuj staris laŭ la formo de la sep steloj de la Granda Ursino. Dekkelkajn metrojn antaŭ la bovoj estas bone konservita ŝtona digo, meze de kiu estas ŝtona ŝtuparo. El tio vidiĝas, ke la feraj bovoj servis siatempe ne nur kiel talismanoj por bridi superakvon de la Flava Rivero, sed ankaŭ kiel ankroj de flosponto. Tio estis valora akvomastroma konstruo. La flosponto estis forbruligita en

milito, sekve de tio malaperis la feraj bovoj por multaj jaroj.

Fakuloj de la Ŝanxi-a Arkeologia Instituto diris, ke krom la supre menciitaj bovoj, ĉe la alia bordo devas esti ankaŭ kvar similaj je 360 m. for de ili. La ne malkovritaj estas dekkelkajn metrojn sub la tero. Ili atendas la homan elterigon.

## ARBOGRIMPAJ FIŜOJ

En Tengchong-gubernio de okcidenta Yunnan-provinco fluas Binglang-rivero, ambaŭflanke de kiu estas senlima primitiva arbaro.

En la klara rivero vivas sennombraj fiŝoj kaj ranoj. Inter ili estas interesaj fiŝoj, kiuj povas grimpi sur arbon. Ĉar la rivero fluas tuj laŭ la primitiva arbaro, tial la arbaro estas ofte superakvita, tiam iuj fiŝoj grimpas supren laŭ arbotrunkoj kaj kroĉas sin al arbotrunkoj aŭ arbobranĉoj per sia suĉilo. Vidate de malproksime ili similas al malhelverdaĵ kapsikoj.

Tiuj fiŝoj vivas en rokfendoj sur la riverfundo. Ili estas platformaj, kun kapo granda kaj vosto malgranda. Lokanoj nomas ilin platkapa fiŝo aŭ grandkapa fiŝo. Ili apartenas al la familio de gliptosterno (*Glyptosternum sinensis*). Ili povas libere movi sin sur rokoj kaj arboj. Ili demetas ovojn sur arboj kaj manĝas insektojn kaj muskon sur rokoj kaj arboj.

## ĈINA MUZEO DE PTEROKARPO

Antaŭ nelonge finkonstruiĝis en Pekino la Ĉina Muzeo de Pterokarpo, investita de s-ino Chen Lihua.

Tio estas konstruaĵo kun tradicia ĉina arkitektura stilo. Tie estas eksponataj 200


pterokarpaj mebloj faritaj en Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911), konservataj de s-ino Chen, kaj pli ol 800 imitaĵoj de palacaj mebloj kaj belaj metiartaĵoj. Multaj el ili estis faritaj de famaj metiistoj el bonegaj materialoj aĉetitaj de ŝi eksterlande kontraŭ granda monsumo. Tie estas ekrano kun gravuraĵo de la fama pentraĵo "Ĉe Rivero en la Festo Brilo kaj Klara". Ĝin faris 500 eminentaj metiartistoj en 2 jaroj. Ĝi bone montras la lignajn trajtojn de pterokarpo. Sur ĝi vidiĝas la perfekta tekniko de gravurado.

La hejmloko de pterokarpo

estas en tropikaj pluvarbaroj de Suda kaj Sudorienta Azio. Pterokarpo kreskas ankaŭ en Ĉinio, tamen tre malmulte. Ĝi kreskas ekstreme malrapide. Nur el pli-ol-100-jara pterokarpo oni povas fari meblon. Kaj plie, pterokarpoj plejparte estas malplenaj interne, tial ege malmultas la taŭgaj materialoj por mebloj. Ĉinaj historiaj libroj notis, ke pterokarpo estas valora kiel oro kaj 20-oble pli valora ol *nanmu*-ligno. Ĝi estas super la pagipovo de ordinaraĵoj homoj. Pterokarpaj mebloj estis alte taksataj de aristokratoj jam en

Ming-dinastio.

La metiartaĵoj de pterokarpo odoras elegantecon kaj fajnecon. Por fari pterokarpan metiartaĵon necesas 14 procedoj, kiaj elekto de materialo, bako, ventumo, ĉizado, gravurado kaj polurado. Ĉiu procedo devas esti serioza. Sur la ekrano "Ĉe Rivero en la Festo Brilo kaj Klara" estas 1.5-metra haŭla ŝnuro 2 mm dika, kiu estis prenita de tuta pterokarpa arbo. Fakuloj konstatis, ke la arta nivelo de la imitaĵoj en la muzeo superis tiun de la aŭtentikaj konservataj en la Muzeo de Imperiestra Palaco en Pekino.



Konservajoj en la Ĉina Muzeo de Pterokarpo

# De Beĵing al Tel-Avivo

de Amri Wandel\* (Israelo)

**F**OJE la kalendaro havas interesajn koincidojn. En 1986 mi vojaĝis kun dek esperantistoj el Israelo al la Universala Kongreso en Beĵing kaj post ĝi rapide revenis al Israelo por kunorganizi la TEJO-kongreson en Neurim. Dek kvar jarojn poste ni organizas la Universalan Kongreson en Tel-Avivo, dum la TEJO-kongreso okazas en Ĉinio...

La UK en Beĵing por mi estis unu el la plej memorindaj, kaj pro la beleco de la lando kaj la urbo, kiujn mi kaj mia edzino tiam unuafoje vizitis, kaj pro la amika akcepto de la esperantistaj gastigantoj. En la oficiala antaŭkongreso, same kiel dum la kongreso kaj dum postkongresa ekskurso, ĉie imponis al ni la kora kaj amikeca akcepto kaj helpemo de lokaj esperantistoj. Ĝis nun unu el miaj plej popularaj lumbildoj pri Esperanto estas tiu, kiu montras grupeton de israelaj esperantistoj sur la Granda Muro.

En 1986, vizito de israelanoj en Ĉinio estis tre malofta okazo, kaj tiu vizito, kiu fariĝis ebla dank' al Esperanto, estis tiom speciala ke aperis pri ĝi artikolo en unu el la ĉefaj tagaj gazetoj de Israelo. Nun, 14 jarojn poste, ni organizas la Universalan Kongreson en Tel-Avivo kaj esperas reciproki tiun gastamon al la ĉinaj partoprenantoj. Por ni, la vojaĝo tra Ĉinio havis tri pintojn: la Granda Muro norde de Beĵing, eble la plej fama simbolo de Ĉinio en la okcidenta kulturo, la terakota armeo en Xi'an, mirinda arkeologia atesto pri glora pasinteco, kaj la luna pejzaĝo de la rivero Lijiang ĉe Guilin, unu el la plej belaj naturaj belecoj, kiuj ja abundas en Ĉinio.

Nun eble mi povas sugesti al la vizitantoj de la ĉi-jara kongreslando Israelo tri similajn

pintojn, kvankam ja tute aliajn:

— Jerusalemo, 4000-jara urbo sankta al tri religioj, kies muroj atestas pri la pasinta gloro, kies preĝejoj, moskeoj kaj sinagogoj plenas je la unika etoso de sankteco, kie la buntaj merkatoj kunfandiĝas kun la modernaj aĉeto-centroj, muzeoj kaj universitato.

— La Morta Maro, la plej malalta loko en la mondo, kun unika kuraca efiko de la sala akvo, kie oni povas flosante legi gazeton, sed ankaŭ la Judea dezerto, natura perlo, kie profundaj dezertaj kanjonoj kaŝas rokajn basenojn, kie la impona monto de Massada kaj ĝiaj mirindaj elfosaĵoj rakontas pri la heroa morto de tricent judaj familioj, kiuj dum tri jaroj kontraŭstaris la legiojn de la Romia Imperio kaj fine preferis la morton al sklaveco.

— Tel-Avivo, la kongresa urbo, kiu aĝas malpli ol cent jarojn, eble pli ol ĉiu alia urbo reprezentas la naskiĝon de Israelo: ĝi kreskis el la sablo, inter dunoj kaj maro, kaj dum malmultaj jardekoj fariĝis la ekonomia, kultura kaj distra centro de Israelo. "Urbo senpaŭza" nomas ĝin la enloĝantoj, kaj vere tia ĝi estas: tage ĝi estas la komerca kaj ekonomia koro de la ŝtato, kaj nokte ĝis matene ĝi transformiĝas al paradizo por nokta vivo: teatroj, aĉetum-centroj, kafejoj, trinkejoj, dancejoj, restoracioj ĉiuspecaj... kaj somere ankaŭ la stratoj, kaj precipe la marbordo logas amasojn da homoj.

Al tiuj tri pintoj aliĝas dekoj da kulturaj, religiaj, arkeologiaj kaj naturaj juveloj, kiel la serena Lago de Galileo, ĉirkaŭita de palmarboj kaj montoj kaj ĉe la alia ekstremo Eilat — kie la tropikaj fiŝoj kaj koraloj de la Ruĝa Maro kuniĝas kun la granitaj dezertaj montoj



Ĉinaj kaj Israelaj e-istoj sur la Granda Muro

por krei ripozan etoson for de la pulsanta moderna mondo.

Israelo estas ankaŭ etnologie kaj socie bolanta mikspoto: ĉi tie restariĝis la juda popolo el la cindroj de la Holokaŭsto, kies teruran historion rakontas la muzeo de "Yad Vaŝem" en Jerusalemo kaj la "Domo de Diasporo" en Tel-Avivo, kie oni povas dum malmultaj horoj sekvi dumil jarojn da historio. Sed tuta Israelo estas ja vivanta etnografia muzeo, kien enmigradis kaj kie miksiĝas kaj lernas kunvivi judoj el ĉiuj partoj de la mondo, judoj kun araboj, israelanoj kaj palestinanoj. Nun, post preskaŭ centjara konflikto, la du popoloj ekmarŝas sur la longa kaj malfacila vojo al paco kaj kunekzisto. Vizitante Jerusalemon kaj la Palestinan aŭtonomion, oni povas spekti tiun procezon efektive okazantan ĉiutage. "Kulturo de Paco" estas ankaŭ la ĉeftemo de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu estis elektita kiel flagŝipa evento de la jaro de Paco de Unesko.

Sendube oni multe lernos kaj vidos en tiu kongreso — pri la lando, pri ĝia popolo, pri ĝiaj kulturaj kaj naturaj trezoroj, pri ĝia kvarmil-jara historio kaj pri ĝia ŝtorma kaj ekscitiga moderna historio, kiu estas forĝata ĉiutage, eĉ dum la kongresaj tagoj. ■

\* Prezidanto de la LKK de la 85-a UK en Israelo



(Daŭrigo de p. 29)

al ili necesa zorgo. Nun ili plene utiligas la materialojn kaj emfazas ĉian ŝpareton. Ili anstataŭigis lignon per plasto en konstruado de kabano, kio donis la saman efikon. La plasta tegmento ne likas nek enlasas venton en vintro, kaj kuŝante en la lito, ili povas rigardi stelojn sur la ĉielo.

Jam plurfojaj reformoj okazis en hejtado. Antaŭ 40 jaroj oni hejtis per pinarboj, 10 jarojn post tio oni uzis seĝaĵon, antaŭ dekkelke da jaroj oni hejtis per karbo, kaj nun oni uzas gason. Oni jam ne rajtas bruligi eĉ nebonajn branĉojn, ĉar splitoj povas esti utiligataj por paperfarado, kaj seĝaĵo — por kulturado de orefungoj.

## PROTEKTI ARBARON

S-ro Ma Yongshun emeritiĝis. Dum sia laborado li faligis 36 000 arbojn. Kaj pro tio li multe malkvietis. Post la emeritiĝo li kun siaj familianoj komencis energie planti arbojn eksplikante la faron, ke li pagos la ŝuldojn. Kiam li kaj liaj familianoj plantis jam 46 500 arbojn, li forpasis en la aĝo de 86 jaroj. Li estis ordinara arbohakisto, sed la homoj de Dahailin respektis lin.

Eksterordinara diluvo de Ĉinio en 1998 fakte estis averto de la naturo. Reduktiĝo de arbaro minacis ne nur la arbohakistojn. Por la akvo, por la aero, por la tero, por la estonteco de la infanoj kaj por ĉiuj vivaĵoj sur la tero, la arbohakistoj de Dahailin havis neniun alian elekton: Ili devas respekti la rajton de la arboj pri la vivo kaj aliĝi al la homa kontrakto. Tiu elekto signifas finon de arbohakado kaj ili devas esti defendantoj de la arbaro.

"La permesita kvanto de hakeblaj arboj malmultiĝas jaro post jaro, kaj ĉi-jare la kvanto reduktiĝis je 4 000 kubmetroj. Ĝi valoras 600 000 juanojn (ĉ. 8 juanoj egalas al unu usona

dolaro), nome unumonata salajro por la tuta personaro de la arbohakejo. Do ni nepre devas havi alian rimedon," diris s-ro Sun. Multaj arbohakaj brigadoj turniĝis en arboplantajn. Sed nuntempe ili nur investas kaj neniom rikoltas. Sed laŭ malproksimvida analizo, ekologia profito estas pli grava ol ekonomia profito. Sed kiamaniere sin vivtenos la arbohakistoj, kiuj antaŭe dependis de arbohakado? Por solvi la problemon, ili faris multflankan entreprenadon.

Subtenate de la registaro, la arbohakistoj sin okupas pri novaj laboroj. Utiligante la lokajn kondiĉojn, ili faras arbaran turisman servon kaj kulturadas "verdajn" manĝaĵojn, kiel



**Emerito Ma Yongshun**  
Foto de WANG SHUGUO

orefungoj. S-ro Sun diris, ke multaj el la arbohakistoj estas malproksimvidaj. Antaŭ kelke da jaroj, kiam la arbohakejo ne povis salajri la laboristojn, iuj sin turnis al nova profesio. La 42-jara Wang Yongyou bredas 18 bovojn kaj kune kun la edzino faras kaj kolportas matenmanĝaĵojn. Tio estas pli multe enspeziga ol arbohakado. S-ro Sun Yuxiang laŭkontrakte kulturadas hektaron da legomkampoj, kio alportas al li grandan enspezon. Iuj junaj arbohakistoj iris al aliaj lokoj

por serĉi vivrimedojn.

"Sed kiu restas kaj prizorgas la arbojn, kiam ĉiuj aliaj foriras?" diris la edzino de iu laboristo de la arbohakejo Shuangfeng. Ŝia edzo ĉiumonate enspezas 300 juanojn, kaj ses dekonoj estas pagitaj por la filo lernanta en mezlernejo. Tamen ŝi ne volis forlasi la arbaron. Ŝi havas multon por fari: en printempo ŝi plantas arbidojn, en somero ŝi forigas malbonajn arbidojn por enlasi sunlumon, en aŭtuno ŝi faras fosojn, sarkas sub grandaj arboj kaj distaŭzas falintajn foliojn, por ke arbosemoj falu kaj ĝermu en la fosoj... En aliaj tempetoj ŝi kolektas en la arbaro manĝeblajn vegetalojn, drog-herbojn, fungojn kaj orefungojn kaj vendas ilin.

Kiam ili flegas arbidojn kiel patrino bebon, ili trovis, ke la homoj kaj arbaro alfrontas komunan malamikon rato. Kaj tiam ili tre sopiras putoron, la komunan amikon de la homoj kaj arbaro. Putoro estas pli taŭga ol homo por forigo de rato. Sed dum longa tempo la homoj malamike traktis putoron. Ili tro multe ĉasis ĝin kaj nun ili malofte vidas ĝin.

Ĉe tio maljuna laboristo rakontis jenan okazaĵon:

En la vintro de 1977 la manĝejo de la arbohakejo perdis ĉiunokte kelke da kilogramoj da viando. Poste ili rimarkis, ke la "ŝtelinto" estis putoro. Ili do spuris ĝin ĝis ĝia nesto en malplena arboradiko. En la nesto grupo da putoridoj estis atendantaj manĝaĵon. En mallumo la okuloj glime radiis bluan brilon. La sekvantan matenon tien iris juna arbohakisto kun segilo por faligi la velkintan arbon. Li estis mirigita de la vidaĵo: La putoroj, malgrandaj sur la dorso de la grandaj, en du vicoj, estis translokiĝantaj, same kiel kompatindaj fuĝantoj.

Kien ili fuĝis? Ĉu ili revenos? En mia imago aperis iliaj belaj piedsignoj sur la neĝo en la arbaro. ■

● Por la fama akvomastroma pivota konstruo ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero oni devas transloki 1.13 milionojn da loĝantoj antaŭ la jaro 2009 el la subakvigotaj regionoj de 20 gubernioj kaj distriktoj de Chongqing kaj Hubei.

Ĝis la fino de 1999 Chongqing kaj Hubei jam translokis 190 000 loĝantojn laŭ la politiko de setlado kaj disvolvo. Antaŭ nelonge la ĉina registaro decidis, ke pli ol 70 000 homoj loĝantaj proksime de Chongqing setlu al Ŝanhajo, Jiangsu kaj aliaj 9 regionoj. El ili 7 000 homoj setlos al Chongming-insulo, Ŝanhajo. La ŝtato subvencios la setlantojn po 30 000 juanojn.

● Antaŭ nelonge komenciĝis la unuaperioda konstruado de la Granda Ŝtata Teatro okcidente de la Popola Halo, Pekino. La teatro estis projektita sub gvido de fama franca arkitekto.

Laŭ la projekto ĝi similas al subakvigita flug-aparato el la kosmo, kun brila ŝelo el titana plato kaj arkaj vitraj muroj meze sur ĝi. Ĝi, malpeza, dura, rustimuna, fortika kaj bela, similas al lante malfermita kosmokajuto. Por atingi ĝian internon, oni devas trairi ovalan vitran enirejon kaj travideblan koridoron sur la akvofundo kaj tiam oni povas ĝui la malebenan subakvan mondon. Post tio oni atingas la teatron, kie estas operejo, koncertejo kaj granda kaj malgranda teatrejoj kun totala areo de 155 000 kvadrataj metroj kaj pli ol 6 000 sidlokoj. La teatro estos finkonstruita en la jaro 2003.

● Ĉinio estas la unua lando produktanta hibridan rizon. En 1996 Ĉinio la unua produktis hibridan rizon kun transformita geno kontraŭ herbicido, kio donis novan metodon por levi la kvaliton de la semoj de hibrida rizo. Post tio oni elkulturis rizon kun transformita geno por rekta semado, kio estas efika por kiel eble plej rapide kaj facile elimini la herbaĉojn en rizkampo. Antaŭ nelonge la Ĉina Akademio de

Sciencoj sukcesis en malĉifro de hereda geno. Tio estas utila al disvolvo de la plinutroriĉa kaj altprodukta rizo. Tiu sukceso estos utiligata ankaŭ de alilandaj sciencistoj.

● La sedimenta baseno de Bohai-golfo formiĝis antaŭ 2 milionoj da jaroj post geologia transformiĝado en 65 milionoj da jaroj. Nun la baseno areo 200 000 kvadratajn kilometrojn kun abundo da oleo kaj gaso. Antaŭ nelonge Ĉinio trovis tie grandan olekampon kun totala rezervokvanto de 600 milionoj da tunoj. La oleo troviĝas 900-1 400 metrojn sub la tero. Pro ĝia malprofunda kaŝiĝo, dika tavolo, malpezeco kaj facila eltiriĝo ĉina fakulo konkludis, ke dank' al




La plej granda olekampo en Bohai-golfo

la eltrovo Bohai estos grava olea bazo en norda Ĉinio en la komenco de la 21-a jc.

● Januare ĉi-jare la deponita monsumo de la ĉinoj unufoje superis 6 000 miliardojn da juanoj, sed en 1979 ĝi estis malpli ol 30 miliardoj.

● Antaŭ nelonge la Komitato de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj sub UN ekzamenis Dazhao-templon laŭ peto de Tibeto, ke la komitato konfirmu Dazhao-templon kiel apendicon de Potala-palaco. Antaŭ tio oni malkonstruis la malrespondajn domojn proksime de la templo.

Dazhao-templo, konstruita antaŭ 1 350 jaroj, estis politika, ekonomia kaj kultura centro en la historio de Tibeto. En 1961 la ĉina registaro komencis preni ĝin kiel ŝtatan historian restaĵon. La areo de tiu proponita monda kultura



Dazhao-templo

heredaĵo kovras 7.5 kvadratajn kilometrojn, inkl. la tutan antikvan urboparton de Lhasa, kaj troviĝas pli ol 100 historiaj vidindaĵoj ĉefe protektataj.

● La Maŭzoleo de la Okcidenta Xia-regno en la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono honorata kiel "orientaj piramidoj" situas ĉe la piedo de Helan-montaro, kun totala areo de 50 kvadrataj kilometroj. Ĝi estas la plej granda historia restaĵo de la Okcidenta Xia-regno (1038-1227).

Tie, krom la imperiestra maŭzoleo, estas trovitaj ankaŭ 253 aliaj tomboj, t.e. tomboj de imperiestraj parencoj, aristokratoj, meritoplenaj ministroj kaj generaloj. Iuj el ili estas grandiozaj: Ili havas eksterajn murojn, stelean kioskon, urnoforman fortikigitan urbeton, internan urbeton, ekranmuron k.a. El la maŭzoleoj la plej granda kovras 20 mil kvadratajn metrojn kaj la plej alta tombo havas altecon de 10 metroj. Ili estas valoraj por esplori la antikvajn nomadismajn morojn, religiojn, militojn kaj naciajn karakterojn.

● Ĉinaj kaj usonaj sciencistoj publikigis en la brita aŭtoritata revuo "Natura" sciencajn tezojn, kiuj diras, ke dank' al esploro pri la fosiliaj maleoloj de ĉinaj kaj jarcentaj eosimioj (*Eosimias*) en Liyang, 170 km okcidente de Ŝanhajo kaj tiuj en Yuanqu, pli ol 500 km sudokcidente de Pekino. Ili konkludis, ke la homaj prapatroj originis el Ĉinio.

Tiu scienca malkovro renverŝis la antaŭan konkludon, ke la homaro originis el Afriko, tiel la antropoidoj aperis je 10 milionoj da jaroj pli frue ol la antaŭa supozo.


ĈINAJ METIARTAJĴOJ

# Bunta vitra botelo

de XIAO XI

La nomita botelo estas globforma kun malgranda buŝo, barela ventro kaj malalta piedo. Kun flava vitra korpo ĝi estas ruĝa, verda, blua kaj oranĝa ekstere kun bildoj de vinberoj, rafanoj kaj lotusfloroj. Sur ĝia kolo estas desegno de baŝoj folioj kaj sur ĝia piedo estas tiu de lotusfloraj petaloj.

La botelo estis farita en la lasta periodo de Qing-dinastio (1644-1911). Ĝi altas 16.8 cm. kaj ĝia buŝo larĝas 1.5 cm. Nun ĝi estas konservata en la Muzeo de la Imperiestra Palaco en Pekino.





La okcidenta parto de Kunming-lago en la Somera Palaco

Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》二〇〇〇年第六期  
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2